

THE BRITISH ESPERANTIST

The Official Organ of the British Esperanto Association.

VOL^o V. N^o 58.

OKTOBRO, 1909.

PREZO 3 PENCOJ.

KOSTO DE ABONO. AFRANKITE.

EN GRANDA BRITUJO:

Por unu jaro	3 ŝilingoj.
Unu numero	3 pencoj.

EKSTERLANDE.

Por unu jaro	\$0.75, fr.4, M.3.
Lau Internacia Mono	Sm. 1.50.

Abonoj estas akceptataj de la kongresigo de ĉiu monato, kaj devas esti pagataj per poštomondata aŭ Ĉekbanka transpagilo. Sin turni al la Sekretario, 133-136, High Holborn, London, W.C.

REDAKCIO.

Manuskriptojn, k.t.p., oni bonvole sendu al la Redakta Komitato, 133-136, High Holborn, London, W.C.

Pri artikoloj la Komitato rezervas al si la rajton korekti la erarojn de stilo, k.t.p.

Ordinare oni ne povas resendi artikolojn neakceptitajn.

ANONCOJ.

Pri Anoncoj, sin turni al la Direkto, THE BRITISH ESPERANTIST, 133-136, High Holborn, London, W.C.

La Kvina Kongreso en Barcelono.

Malgraŭ la aantaŭimoj de kelkaj, la Barcelona Kongreso efektive okazis, kaj kiel ĉiu antata Kongreso, estis grada sukceso. Kiel kutime, oni multe interamikigis, multe laboris, multe amuzigis, kaj malgraŭ la fakteto, ke la ĵusa politika malfrankvileco sendube restigis hejme multajn samideanojn, tamen la nombro de la ĉeestintoj (1,340), reprezentantaj pli ol 30 nacioj, estis ne multe malpli granda ol ĉe la Dresdena Kongreso.

Ciu Esperanta Kongreso gis nun estis rimarkinda per iu speciala eco, kiu ĝin karakterizis distinge de la ceteraj. Bulonjo estis antaŭ ĉio la Kongreso de neforgesbla entuziasmo; la Genevan memorindigis la belajojn naturajn de la Svisa lando; en Cambridge, ĉiun frapis la bona organizado; en Dresdeno, oni admiris la bonegajn koncertojn kaj imponantan oficialan lukson de la arangoj. Kaj kio karakterizis nian lastan Kongreson? Ni kredas kun D-ro Zamenhof mem, ke en Barcelono, pli klare ol en antaŭaj jaroj, konstatiĝis la fakteto, ke nia lingvo nun ne estas plu ia projekto, sed efektiva vivanta lingvo kore amata kaj flue parolata jam de tre multaj nacioj. Neniu, kiu ĉeestis la vigilajn diskutadojn en la Agadaj Kunidoj, kaj rimarkis kiel facile fluas la paroloj sur la lipoj de la diversaj oratoroj, povus havi plu pri tio eĉ ombreton de dubo.

OFICIALAJ SUBTEGOJ.*

En ĉiuj landoj la signoj de oficiala aprobo al Esperanto pli kaj pli multigas. Kompreneble, ankaŭ en Barcelono ili ne mankis. La Reĝo de Hispanujo, Alfonso XIII., kiu jam montris sian simpation al nia afero, akceptante la honoran prezidantecon de la Kongreso, bonyenigis la kongresanojn per speciala

* Lasthare ni per sia kolego *La Revuo* ekscias, ke sia Rego Mosto de Hispanujo nomis D-ron Zamenhof, Komandoro de Elizabeto la Katalika.

ENHAZO.

	PAGO
La Kvina Kongreso Esperantista. W. MANN	181
Poemoj kronitaj en la Floraj Ludoj	188
Antaŭkongresa Propaganda Vojago. H. B. M.	189
Fabeloj (Wilhelm Hauff). J. W. EGGLETON	190
Libraro kaj Gazetaro	193
Brita Kroniko. W. W. M.	194
La Ganduro de Mahometo, trad. A. E. LEE	198
Mia Kredo. A. J. A.—Letters to Editor	199
B. E. A. Council Meeting, New Members, Examinations.—F. K. I.	200

La Kvina Kongreso en Barcelono.

telegramo, kaj al ilia telegramo de danko sendis pluan respondon de certigo pri sia koraj bondeziroj por la sukceso de nia afero.

Oni jam anoncis, ke la Ministraro de Fremdlandaj Aferoj de Hispanujo mem invitis la diversajn registrojn sendi oficialan reprezentanton al la Kongreso. Specialaj delegitojn ja sendis la registroj de Usono, de Belgujo kaj de Norvegujo; el la ceteraj, la plejmulto reprezentigis sin per sia konsulo en Barcelono.

La urbestraro de Barcelono, kaj ankaŭ la deputitaro de Katalunujo partoprenis persone en la ĉefaj festoj kaj faris en la lasta vespero de la Kongreso imponantan oficialan akcepton al ĉiuj samideanoj. Krom la Barcelono, kvin hispanaj urbestraroj sendis oficialajn delegitojn al la Kongreso, kaj same faris ankaŭ tiu de la bohema ĉefurbo Praha.

Jam dum kelkaj monatoj antaŭe estis farata oficiala kurso Esperanta al la anoj de la Gvardio Urba, kaj la Gvardiestro mem letris paroli lerte la lingvon.

Farinte tiujn generalajn rimarkojn, ni prezentu iom pli detale, por tiuj kompatinduloj, kiuj ne povis mem partopreni, la diversajn okazojn de la kongresa semajno.

LA VOJAGO.

Por ni persone, la vojago el la hejmo alilandeni estas ĉiam unu el la plej interesaj partoj de la kongresa farado. La esplorado de la mapo (geografia karto), la notado de l' diversaj vidindajoj sur la vojo sekvota, la kelkmonata antaŭguado, la iom post ioma alproksimigado de la dato de foriro, ĉiam sentigis al ni vivan plezuron. Kaj ĉi tiun fojon, la afero havis specialan carmon, ĉar ĉu ni ne vidos la Mediteranean Maron, la bluegan maron sur kies belaj bordoj koncentrigis dum jarcentoj la civilizacio de l' mondo? Estis do kun agrablegaj antaŭsentoj, ke ni atendis la 1-an de

Septembro, la daton elektitan por la foriro. Kaj jen fine ni sidas en komforta, rezervita fako de l' vagonaro, facile glitante al Newhaven aŭ Folkestone... for de Londono, for de la nuba ĉielo. Vivu Barcelono, kaj blua ondaro de centra la mar!

La bonegaj vaporsipoj, kiuj dejoras inter Anglujo kaj Francujo, faras la maran transiron en ordinara vetero vera plezuro; ĉiuj do alvenis Parizon vespere sufice frēsaj kaj viglaj. En la Parizaj stacidomoj atendis kelkdeko da francaj amikoj por fari al ni varmegan samideanan saluton. Car tamen la horo estis malfrua, la plejmulto de la alvenintoj post kora manpremado forveturis bone dormi, por esti preta al la morgaŭa promenado tra la urbo. Nia loĝejo, kie fine kolektigis preskaŭ cent vojaĝantoj, estis bonega, *l'Hotel International*, 11, rue Bachaumont, kaj pro ĝia prezmodereco kaj pura komforta arango moderna ni kore rekondas ĝin al ĉiuj Esperantistoj, kiuj vizitos Parizon. La sekvintan tagon oni pasigis promenante en benkveturilo, tiel vidante en plej oportuna maniero la ĉefajn vizitindajojn de la urbo. Oni ankaŭ vizitis la oficejon de la Presa Esperantista Societo, la redakciejon de nia multlegata kolego *Lingvo Internacia* en la rue Lacépède, por saluti tie la fervorajn batalantojn S-rojn Llengyel kaj Politzer, kiuj bedaŭrinde ne povis iri Barcelonon. Interesa okazintajo estis la haltigo de nia ĉaro sur la *Place de la République*, kie ni disdonas al rapide kolektiginta homamaso francajn propagandilojn, kaj S-ro Blaise, laŭ angla kutimo, faris propagandan paroladeton al interesata kaj scivola aŭdantaro.

Vespere okazis festeno kaj koncerteto arangita de la Esperantistoj de la 3a arondismento. Oni intersalutis, toastis, babiladis, kaj post gaja dancadeto ree kuſigis, sentante sin jam en la dolĉa lando Esperantujo.

Vendredon matene, preskaŭ duono de la angla anaro forveturis jam suden, kaj je duono post la oka vespere ankaŭ la ceteraj, nun kun multaj francoj, estis ree en vagonaro, en la stacidomo de la *Quai d'Orsay*, komencontaj la 12-horan veturon al Toulouse. Multaj veturis triaklase, kaj ĉar triaklasa fako sur franca servojo tute ne estas luksa kuſejo, kelkaj pasigis noktacon iom malagrablan. Sed kun la alveno de la taglumo oni iom forgesas la genojn de la dormprovado, kaj turnas sian atenton al la pejzaĝo, kiu nun pli kaj pli alprenas sudlandan aspekton. Vagonaĝo en Toulouse: la senlace klopoanta amiko Blaise iras arangi pri rabatpreza duaklasigo de l' biletogis Port-Bou, por ke ni tie alvenu per rapida vagonaro sufice frue por povi jam en tiu sama tago veturi al Barcelono.

Kun ni estas nun multaj aliaj samideanoj, kiuj aligis diversastacie dum nia veturado, kaj kiam fine, transirinte la hispanan landlimon, ni elvagonigas en Port-Bou, la stacidoma perono ŝajnas plena de Esperantistoj. Plenumigas la formalajoj de la dogano, kaj nia kompanieto nun volas aĉeti la biletojn al Barcelono. Sed baldaŭ vidigas, ke la malgranda vagonaro dejoronta por tiu veturo tute ne sufices por enhavi ĉiujn Esperantistojn nun en la stacidomo! Kion fari? Agitata amaso da gevojagantoj ĉirkauzumas la hispanan amikon, kiu prenis sur sin la zorgoplenan rolon de landlima interpretisto: Kion ni faros, sinjoro? Kie estas mia valizo? Kial oni ne mendis vagonaron pli longan? Pardonu, sinjoro, ĉu vi afable diros... k.t.p. Falas sur la kompatindulo pluvego da demandoj, demandetoj, demandaĉoj, plendoj, ĝis li ne scias kien sin turni. Malespere li alvokas la staciestrion, oni parolas pri venigo de speciala vagonaro, oni petas kaj proponas tiun aŭ alien, la staciestro ankaŭ ekscitigas, gestegas, kaj dum la sola vagonaro, ĝis la kordonoj plenplene de Esperantistoj, malrapide forglitas je ve-kriado de la postlasitoj...

Vole nevoie ni devas akcepti nian sorton, kaj ni jam komencas pripensi rimedojn por pasigi la nokton. Post

kiam denove regas trankvileco, oni sciigas nin, ke se ni deziras, post telegrafo komunikado kun Barcelono oni venigos specialan vagonaron, sed por tio ni devas kolekti almenaŭ 50 vojagantojn. Ree okazas vigla movigo, ĉar la plejmulto jam distrigis eksteren tra la vilago, kaj devas esti serĉataj. Sed intertempe ju eltrovas, ke la speciala vagonaro ne povos alveni ĝin en Barcelono antaŭ maloportune fruega horo de la nokto!... Fine ni decidas ne mendi la "specialan"; per komplezo de la staciestro oni alvenigos jam antaŭ meznokto la vagonaron ordinaran, en kiu ni povos dormi ĝis ĝi forveturos matene je la kvara, kaj tiel alvenos en Barcelono je horo, kiu permesos al ni facile iri al niaj hoteloj.

Dume, mangado, promenado, babilado, laŭplaĉe. Persono ni iras kun kelkaj amikoj esploristi la vilagon, kaj ripozante sur roko apud la haveno ĝui la dolĉan trankvilecon de la suda nokto, kaj admirila grandiozan spektaklon de l' steloj, kiujn neniam antaŭe ni vidi mirinde klaraj kaj multenombraj.

Antaŭ ol iri kuſigi en nia improvizia vagonara hotelo, ni aligis al kompanio da samideanoj, kiuj, kun Profesoro Cart kaj kelkaj lokaj Esperantistoj, procesii al placo apud la haveno. Tie oni en la duonlumo dancis la faman "Rondon" Esperantan... Tiam, fine, dormado, matene ankorau iom da veturado, kaj jen Barcelono...

SABATON, LA 4AN.

La malfrueco de nia alveno bedatrinde malpermesis, ke ni persone ĉeestu por vidi la akceptojn, kiujn oni faris al D-ro Zamenhof. Per la Barcelona gazeto *La Publicidad*, en kiu du fojojn ĉiutage dum la Kongreso aperis raportoj hispanaj kaj esperantaj pri la kunvenoj, k.t.p., ni sciigis, ke jam hierau, je la 5a horo vespere, la Majstro estis oficiale akceptita de la autoritatoj. Antaŭire de la brilkirasaj rajdistoj de la urbo, li, kun la Loka Organiza Komitato, la Konstanta Komitato, la Akademianoj, k.a., iris al la Urba Domo, kie lin atendis la urbestro, D. Francisco Layret, kaj la urbkonsilantoj. Post la parolado de la urbestro, kiu konstatis la grandan honoron, kiun sentas Barcelono akceptante kaj gastigante la Esperantistaron, D-ro Zamenhof en la nomo de ĉiuj samideanoj esprimis sian tutkoran dankon. Foririnte de la Urba Domo, la gastoj estis ankaŭ oficiale akceptitaj de la Provinca Deputataro kaj de la Provincestro.

DIMANCON, LA 5AN.

Matene la Esperantistoj estas videblaj frue multnombre sur la Rambluj kaj la ĉefaj apudaj stratoj, promenante en la varma matena aero, acetante florojn, rigardante la belajn butikojn. Jam je la oka multaj kongresanoj iras tramveture al la Palaco de l' Belarto, por atendi la malfermon de la Akceptejo. Tie baldaŭ la fervora sekretariino de la Kongreso, S.-ino Rebours de Pujolà, kun la diversaj fakaj sekretarioj, respondadas al avidaj demandoj de l' alilandaj samideanoj, kiuj ĉiam pli kaj pli multnombrigas. Kelkaj ankaŭ iras partopreni la Esperantajn Diservojn. Unu, por la Katolikoj, estas farita de Abato Richardson en la Preĝejo de la Bonfarada Domo. Alia, por la Protestantoj, estas farita en la Angla Preĝejo en *Calle Rosellán* de Pastro J. C. Rust, kiu parolis tre interese kaj fratece laŭ Rom. xv. 24: "Kiam ajn mi vojaĝos en Hispanujon, mi vizitos vin." Dume la sceneo en la grandega centra navo de la Palaco estas plej pitoreska. De la altaj galerioj ambaŭflanke pendas gajkoloraj flagoj naciaj, alilandaj kaj esperantaj, kaj dum la diversaspekta amaso atendadas sur la vasta pargedeto la komencon de la Akcepta festo, ludas vigligajn ariojn la Municipala Muzikistro, kaj la infanoj de la urbaj lernejoj, jus reveninte el kampara libertempo, dolĉe kantis naciajn ariojn. Ekstere sur la granda ŝtuparo, S-ro Ribe, la estro de la rugvestita gvardio urbana,

multe helpas persone donante informojn en *Esperanto* al la enirantaj vizitantoj.

Nun alvenas la urbestro kun multaj urbkonsilantoj, kaj je kvarono post la dekunua aperas la Majstro mem. Lin akompanas S.-ino Zamenhof, S.-roj Pujulà kaj Sabadell, prezidanto kaj vic-prezidanto de l' Kongreso, la sekretarioj de la lokaj kongresfakaj komitatoj, Generalo Sébert, Rektoro Boirac kaj aliaj eminentaj Esperantistoj. Longa aklamado salutas la eniron de la kara Doktoro, kiu poste en flanka salono diras kelkajn afablajn vortojn de bonvenigo al la kunvenintaj Esperantistoj, kaj la festeto finigas je la sonoj de l' Himno Esperanta "La Espero," ludata de la Urba Muzikistaro. Je la dekdua okazis en la Pariza Salono tre interesa Artekspozicio organizita de la Esperantista Vagabonda Klubo, ĉe kiu ĉeestis D.-ro Zamenhof. S.-ro Chavet, sekretario de la Centra Oficejo en Parizo, inaŭguraciis la ekspozicion per parolado.

Por la posttagmezo, la ĉefa programero estis futbala turniro arangita de la Klubo "Numancia." Ses partioj plej energie partoprenis, kaj vetludadis tiamaniere, ke fine restis nur du por la fina ludo, al kies gajninto la Majstro mem prezentis la ĉefpremion, artan medalon kun Esperanta bantligajo. Sajnis iom strange al ni angloj, vidi futbalon ludatan en vetero tiel varmega, sed la ludantoj mem neniel ŝajnis genataj, kaj faris tre "rapidan" piedmovadon dum la 30 minutoj difinitaj al ĉiu ludo. Dum la turniro, la lernantoj de la "Industria Lernejo de Teksistoj" en Sabadell prezentis al D.-ro Zamenhof lian portreton, faritan el silkteksaĵo.

Dume en alia parto de l' urbo okazis "Batalo de Taŭroj." Inter la 10,000 spektatoroj troviĝis ankaŭ kelkaj Esperantistoj, kiuj iris por juĝi mem pri la spektaklo. Ni ankaŭ poste iris al "Batalo" en kiun partoprenis kelkaj famaj "toreadoroj." Kun miksitaj sentoj ni sidis kaj rigardis gaje vestitan mortigistaron buĉadi turmente du* belegajn bestojn, je salutado de trumpetoj kaj aprobanta blekegaro de popolamaso, sed ni ne nomus tian fi-spektaklon sporto. Kaj kiel humana popolo povas toleri, ke oni tiel oferu al la kornoj de furioziga besto blindigitajn ĉevalojn, ni ne povas kompreni. Ni gojis sciigi, ke multaj hispanoj — inter ili multaj el la futbalistoj — ankaŭ malamas tiun kruelan ludon, kaj ke ekzistas kontraŭ ĝi kreskanta ligo.

Vespere, okazis bona koncerto en la Teatro Romea. Bela programo estis lerte kantita de F.-ino O. Fargas, Marthe Prévost kaj S.-ino Decourt. Speciale ŝatinda estis la sceno el "Alcesto" majstre deklamita de F.-ino Maria Brücker el Parizo.

LUNDON, LA 6AN.

Lundo estis la tago difinita al la oficiala malfermo de la Kongreso. Matene je la 9a kunvenas en specialaj ĉambroj en la Palaco de l' Belartoj la diversaj nacioj por elekti reprezentantojn. La angloj delegis S.-ron H. B. Mudie kiel reprezentanton, kiu S.-ro J. Ellis kiel anstataŭanto. Kiel kongresfarinta lando, Anglujo devis ankaŭ elekti unu anglon vic-prezidanto de l' Kongreso. Oni nomis por tio S.-ron A. E. Wackrill. La skotoj sin reprezentigis per S.-ro Wilson, kaj Irlando per Pastro Parker.

La Solena Malferma Kunsido komencigas je la 10.30. Sur la estrado apud la Majstro sidas S.-ro Layret, urbestro de Barcelono; S.-ro Boirac, Prezidanto de la Akademio; Generalo Sébert, S.-ro H. B. Mudie, Profesoro Carlo Bourlet, membroj de la Konstanta Komitato de l' Kongresoj; la sekretarioj de l' Kongreso: S.-ro G. Chavet, S.-ino Rebours Pujulà kaj S.-ro J. Boirac, filo. Ankaŭ la vic-prezidantoj kongresnaciaj jus elektitaj: S.-roj Sabadell kaj Peregoro por Hispanujo, Prof. Th. Cart por FRANCUJO, S.-ro R. de Saussure por SVISUJO, S.-ro Wackrill por ANGLUJO, S.-ro Kandt por

* Jam suficiis por ni; sed restis ankorau ses mortigotaj, kiam ni teriris.

GERMANUJO, S.-ro H. Harris por USONO, kaj S.-ro Van der Biest por BELGUJO. Plue, la diversaj naciaj Esperantistaj delegitoj, la oficialaj delegitoj de l' registaroj de USONO kaj BELGUJO (tiu de NORVEGUJO, malhelpate ĉeesti, sin senkulpigis per telegramo), la oficialaj delegitoj de la urbestraroj de VALENCIA, CARTAGENA, TERRASSO, VILLA NUEVA, SAN SEBASTIAN kaj PRAHA.

Unue D.-ro Mybs, prezidinto de la Kvarta Kongreso en Dresdeno, transdonas sian oficon al S.-ro Fred. Pujulà y Vallès, prezidanto de la Kvina Kongreso.

La Urbestro de Barcelono salutas katalune la kongresanojn. S.-ro Bremon tradukas Esperanten lian paroladon: Li bedaŭras, ke li ne povas esprimi siajn sentojn Esperante, tiom pli kiam li vidas la grandan manifestacion, kiun faras la alvenintaj Esperantistoj. Li salutas ĉiujn kongresanojn en la nomo de l' urbo, kaj esperas, ke la Kongreso antaŭenhelpos la movadon. Li esperas, ke Esperanto pli kaj pli oftigados la rilatojn inter la diversaj popoloj.

S.-ro Pujulà, responde al la aklamoj, kiuj lin salutas, diras, ke ne al li persone iras niaj dankoj, sed al la Esperantistoj de ĉi tiu lando, kiuj tiel fervore laboris dum la pasintaj monatoj. Li diras, ke en Barcelono mem estas nun almenaŭ 3,000 Esperantistoj aligitaj al la diversaj kluboj, kaj ankoraŭ multaj ne aligitaj; ankaŭ en la ĉirkaŭa regiono estas pli ol 3,000 samideanoj. Ne li, sed ili estas la prezidanto, kaj por ili li akceptas niajn salutojn. Ciam pli kaj pli firme staru la standardo de nia celo!

Nun starigas D.-ro Zamenhof por fari sian malferman paroladon, kaj la fervora aklamado, kiu salutas lian starigon, montras, kiel multege li estas respektata kaj amata de ĉiu Esperantisto. Ĉi tiun fojon — fakteto certe tre bedaŭrata de ĉiuj — li parolis multe pli mallonge, ol kutime. Li kore dankas en la nomo de la samideanaro la urbestraron de Barcelono kaj la registaron de Hispanujo pro la multvalora subteno, kiujn ili donas al Esperanto; aludas la bonegan progreson faritan ĉiuflanke dum la pasinta jaro, kaj esprimas la esperon, ke la diskutadoj dum la Kongreso estos fruktodonaj por la bono de nia afero, kaj ke la festoj donos al ĉiu novan forton por la laboroj de la jaro venonta.

Poste komencigas la paroladoj de la naciaj delegitoj. Tiun ĉi jaron ili estis ĉiuj bonaj, mallongaj, ofte spritaj, kaj trafaj. En Hispanujo, Ŝajne, ne mankas lingvoj, ĉar starigis por tiu lando reprezentantoj por lingvoj Kastila, Vaska, Asturia, Valencia, kaj Kataluna! S.-ro Baker, redaktoro de *Amerika Esperantisto*, parolante kiel delegito de AMERIKO, instigis ĉiujn veni proksiman jaron partopreni "la Sesan" en Usono. Ameriko — li diris — estas kvazaŭ vivanta simbolo de la interfratiga ideo de la Esperantismo, ĉar ni havas sangan kunligon kun la tutu homaro. En Ŝikago estas pli da Germanoj ol en Berlin, pli da Bohemoj ol en Praha. Mi esperas, ke vi ĉiuj venos proksiman jaron por vidi viajn parencojn!

S.-ro Chavet legas kelkajn el la multaj telegramoj, venintaj el ĉiuj partoj de l' mondo por alporti la salutojn de forestantaj samideanoj. Inter ili estis tiu de Michaux, la neforgesebla organizinto de nia Unua Kongreso, kiu nepre ĉeestos la 6an; de Jean Borel en Berlin, de D.-ro A. Zamenhof; de S.-ro Lucien Cornet, la franca senatano kiu prezentis al la franca Ĉamro de Deputitoj proponon enkonduki Esperanton en la francaj lernejojn; de D.-ro Robin en Rumenujo, kiu diris, ke la regino Carmen Sylva promesis lerni Esperanton; de Shanghai, de Bukharest, Cracow, de S.-ino Rosa Junck en Bordighera, de Kabe en Varsovio — al kiu oni sendis specialan telegramon de simpatio pro lia nepovo ĉeesti — k.t.p., k.t.p.

Malgajgan sciigon donis la Majstro, anoncante la morton de la energia dana propagandistino samideana, F.-ino Schröder el Kopenhago, kiu, vojirante al la

Kongreso, pereis en abismo en la Svisaj Alpoj. Lau lia peto ĉiu ĉeestanto levigis en sia loko kaj staris silente, kiel signo de la komuna malĝojo pri la malfeliĉa okazo, kaj oni decidis sendi al la funebranta familio de la mortintino telegramon de profunda kondolenco.

La kunsido, interrompita tagmeze, rekomencigis je la 3-a.

Daŭrigas la salutoj de la naciaj delegitoj, kaj poste diversaj samideanoj prezantas ideojn pri metodoj kaj rimedoj de propagando. Parolas S-ro Mann pri "Kalkaj Principoj de Propagando: Ciu-eco, Cie-eco, Libereco, Modesteco"; S-ro Blaise pri propagando inter la komercistaro kaj pri la Ĉekbanko de Ĉefĉe; S-ro Cart pri la utiligindeco de la Ĉefĉeaj Ŝlosiloj; S-roj Allende kaj Priyat parolas pri propagando ĉe la gazetaro. Poste oni diskutas pri la uileco de specialaj signoj por rekonii la naciecon de kongresanoj. La kunveno fermigas je la 5.15.

Vespere, multaj ĉeestas koncerton en la Teatro Romea aranĝita de la Esperantista Vagabonda Klubo.

MARDON, LA 7AN.

Iom antaŭ la deka horo matene, D-ro Zamenhof, akompanata de Generalo Sébert, D-ro Mybs, S-ro Pujula kaj aliaj samideanoj, iris viziti en lia oficejo Baronon de Bonet, la Rektoron de la Universitato, kaj danki lin por la afable komplezo, kiun montras la Universitatestroj, metante je la dispono de la Kongreso la bonegajn ĉambrojn por la kunvenoj.

Poste ili iras en la "Paraninfon," kiu jam estas tutplenigita de geesperantistoj atendantaj la malfermon de solena ĉiujara kunsido de la Universala Esperanto-Asocio.

D-ro Zamenhof malfermas la kunsidon. S-ro H. B. Mudie, Prezidanto de la Asocio, dankas la kongresanojn, ke ili per tiel multenombra ĉesto montras sian intereson kaj subtenon je la grava laboro de la U.E.A. Li diras, ke jam aliĝis pli ol 5,000 membroj, sed oni deziras, ke ĉiu helpu kaj partoprenu laueble en la laboro, kiu pli kaj pli montras al la mondo la praktikan valoron de Esperanto.

Poste S-ro Hector Hodler, vic-prezidanto kaj fondinto de la U.E.A., starigas por legi sian jaran raporton pri la agado de la Asocio.

La agado de la Asocio, kiu farigas ĉiusemajne pli vasta, estas dividita en ok fakojn: Administrado, Financo, Esperanto-Oficejoj, Konsuloj, Turismo, Komero, Junuloj, Aerveturado. La Asocio funkcias laŭ veraj Esperantismaj principoj: organiza unueco flanke de plena libereco por individua iniciativo kaj fervoro. Dissendigis dum la pasinta jaro pli ol 4,000 ekzempleroj de la Oficiala Jarlibro, kaj ĉiu nova eldono rapidege elvendigas. En dekdu monatoj, la nombro de la membroj kvinobligis, kaj la konsuloj plimultiĝis de 156 gis 460. Ekzistas 145 konsulinoj por sinjorinoj.

Legigas je brua aplatiado telegramo de lia Rega Mosto de Hispanujo kaj la Ministraro, salutanta D-ron Zamenhof kaj ĉiujn Esperantistojn.

La Majstro nun levigas por paroli. Li salutas kore la anojn de la U.E.A., institucio tiel grava por nia afero. Kompreneo de tiu graveco oni montras per la nuna multnombra ĉesto. Kio estas la esenco de tiu graveco? Nia ideo, li diras, prezantas ion komunan, ion, kio instigas al komuna laboro. Por tio oni devas ligigi. En Bulonjo, oni estis kontraŭ ĉia ligigo, opinis ĝin apkorati antaŭtempa. Sufiĉas kiel ligilo, oni diris, la interna ideo de Esperanto. Sed la interna ideo ne suficias por la plena praktika utiligado de nia lingvo. Por tio oni bezonas organizadon. Tre felice venis al kelkaj servoruloj la ideo fondi ĉi tiun privatan institucion por praktikaj celoj, kaj tiel kreis ion, kontraŭ kiu neu povus ion havi. En la U.E.A. ekzistas por ĉiu laboremulo jam tre vasta kampo de laborado. Ĉiu

volas labori ne sole por Esperanto kiel lingvo, sed kiel praktika faciligilo de la rilatoj inter la popoloj. Sen la U.E.A., io tia estus tute neebla. Nenio povas esti pli grava por nia afero, kiu ĉiam pli kreskas, pli potencigas. Li do deziras al ĉiu sukceson en la Asocia laborado, kaj prezantas, en la nomo de ĉiuj Esperantistoj, sian sinceran dankon al tiuj, kiuj fondis la U.E.A.

Trioblaj ritma aplaudadego salutis tiujn multesatatajn vortojn de aprobo.

Poste S-ro Rousseau paroladis pri la Financa Fako, kaj fine oni disdonis la premiojn al la gajnintoj en la tutmondaj konkursej, kiujn organizis la U.E.A. pri la plej bonaj kaj trafaj rimedoj por la praktika aplikado de Esperanto.

Tuj post la fermigo de tiu kunsido, okazas en la sama loko solena kunveno de la Internacia Instituto de Esperanto fondita de S-ro Edmond Privat. Sur la estrado sidis D-ro Zamenhof, Prof. Cart, Generalo Sébert, S-roj Grabowski, Boirac kaj aliaj.

S-ro Privat, klariginte unue la labron de la Instituto, kiu arangas praktikajn ekzamenojn, en Esperanto pri Esperanto kaj Esperantismo, faras bonegan ĉiupunkte aplaudatan paroladon pri "Vivanta Lingvo de Vivanta Popolo." Li montras kiel Esperanto, sub la plumo kaj sur la lipoj de ĉi popolo Esperantistara, farigis vere vivanta lingvo. Tion ebligas la granda ideo kaj la profunda sento, kiujn la lingvo portas en si, kaj kiudonas al ĝi per la entuziasmo de ĝiaj adepto, ĝiajn kantojn, ĝiajn simbolojn, ĝian poezion, ĝian literaturon, unuvorte ĉion, kio faras la vivon de la lingvo. Kaj estas tiu interna ideo, tiu interna sento, kiu jam dedukej jaroj estas ĝia plej bona garantio kontraŭ ĉiuj teoriaj projektoj de artefaritaj lingvoj kaj reformoj, kiuj ĉiujare naskigas, sangigadas kaj mortas.

D-ro Zamenhof gratulas la Instituton pri ĝia laboro, kaj diras, ke ĉiu Esperantisto povas sentime subteni institucion direktatan de Esperantisto tiel energie kaj agema, kiel S-ro Privat. Li ankau tre varme dankas S-ron Privat por lia rimarkinde elokventa parolado pri la vivo de nia lingvo.

Post la fino de la kunveno, multaj enskribigis sin por la ekzamenoj de la Instituto okazontaj posttagmeze kaj morgatie.

Dum la tago ankaŭ okazis kunvenoj de diversaj specialistej: farmaciistoj, legistoj kaj kuracistoj. En la lasta, prezidita de D-ro Zamenhof, oni decidis, ke de nun la konata revuo *Voĉo de Kuracistoj* dediĉos regule du paĝojn al raportoj pri la agado de la ĉiam pli graviganta "Tutmonda Kuracista Asocio."

Posttagmeze multaj faris interesajn ekskursojn al la agrabla marvilaĝo Sitges, al la bela monteto Valvidrera, al la fantazio Parko Güell. Altaj faris promenojn tra la turbo, kaj gvidate de la bonaj informoj donitaj en la Kongresa Libro, vizitis la ĉefajn vidindaĵojn. Tiun bele presitan Kongresan Libron — ankaŭ multuzitan aŭtografakirilon! — oni ŝuldas al la klopodoj de S-ro Gelabert.

Vespere, je la kutima malfrua horo 10a, denove konceerto, ĉi tiun fojon en la vasta centra halo de la Belarto. Ĉeestis ankaŭ, en la flankaj galerioj, multaj neesperantistaj urbanoj. La programo konsistis el naciaj kantoj katalunaj kaj aliaj, plej harmonie kantataj de granda geharistaro de la fama urbo "Schola Orphonica," sub la kondukado de Majstro Marcet, kun orgena akompano de Prof. Eusebi Daniel. Precipe placis al la aŭskultantaro la du lastaj partoj de la konceerto, kie oni kantis la belajn "Montanyes Regalades" (katalunan), "Vou-veri-vou" (majorkanulkanton) kaj "Al la Fratoj," horon kun nova muziko.

de Onia Farga. La solistoj estis S.-ino Elissa Gallinat kaj S.-ro Conrat Giral. La sencon de tiuj karakterizaj arioj permesis sekvi paralela traduko en la elegante brošurita programo.

MERKREDON, LA 8AN.

Merkrede, ne okazis Agada Kunsido. Anstataue fariĝis en la Parko, sub la direktado de Generalo Priou, franco, grandskalaj eksperimentoj de la "Rug'a Kruco," dum kiuj oni uzis ekskluzive la Esperantan lingvon. Partoprenis en la servado la tutu Barcelona Rug'a Kruco kaj kelkaj francaj Rug'krucistinoj. Sur kampo oni kuſigis diversajn fremdlandajn Esperantistojn, kiuj konis nek la francan nek la katalunan lingvon. Al tiuj ŝajnigitaj vunditoj alkuras subite la katalunaj kaj francaj Rug'krucistoj, kaj forportas ilin al la kamphospitalo, kie tiuj ilin ekflegas kuracisto, uzante nur Esperanton kiel interkomprenilon. La eksperimentoj plene pruvis la efikecon de nia lingvo por tiu celo, kaj multe impresis la rigardantojn, inter kiuj, krom D-ro kaj S.-ino Zamenhof kaj multenombrega publiko Esperantista kaj neesperantista, troviĝis S.-ro Montaner, la delegito Rug'kruca de la Katalunaj Provincoj, la regiona prezidentino Rozo Alier.

Posttagmeze okazis interesa ceremonieto. En placeto inter la ĉarmaj ĝardenoj de la Parko, staras statuo de fama kataluna poeto Aribau, kiu estis rimarkinda pro tio, ke li antaŭdiris internacion parolotan lingvon, kiu fratigos ĉiujn popolojn. S.-ro Pujulà parolis pri la tributo, kiu la Esperantistaro pretoj ŝuldas al la poeto. D-ro Zamenhof, siavice laudinte tiun defendinton de lingvo internacia, solene malkovris verdiĝe tegitan tabuleton metalan, kie estis gravuritaj la vortoj: La Esperantistoj dum la Va. Kongreso al ARIBAU, Barcelono, 1909. La vic-urbestro, S.-ro Puig, dankis en la nomo de la urbo, kaj S.-inoj Zamenhof, Pujulà kaj Sébert almetis grandajn bukedojn sur la monumenton.

Nun la kongresanoj kolektigas en la Palaco de la Borsa por la Festo de la Floraj Ludoj, organizita de *La Revuo* kaj la samnoma festo kataluna, kie oni kutimas honori per premioj la venkintojn en nacia literatura turniro. La granda antikva halo, pregejosimila, gaje ornamita per gracie pendantaj standardoj Esperantaj, kaj traplenigita de l' goja amaso samideanara, faris ĝarman bildon. Sur la ĉefaj navoj, en brilkirasa parada uniformo, honorstaris la soldatoj de la nacia gyario. Ĉe unu fino de l' salono, sur luksa rugvelura tribuno, staris trono, atendanta la Reĝinon de l' Festo. Antaŭ ol komencigas la festo, la "Societat de Atracció de Forasteros" disdonigas inter la sinjorinoj en la ĉeestantaro belajn bukedojn. Je la kvara horo, kun la urba muzikistaro ludanta "La Espero," eniras sur la tribunon la urbestraro de Barcelono kaj la deputitaro de Katalunujo. Sur la alia flanko de la tribuno prenas loko D-ro Zamenhof, S.-ro Carlo Bourlet (la prezidanto de la Ludoj), S.-ro Pujulà, kaj aliaj. Lia Urbestra Mosto S.-ro Layret, parolante en Esperanto, anoncas la feston malfermita.

Post multapladataj paroladoj de S.-ro Bourlet kaj S.-ro Grabowski, sekretario de la Ludoj, D-ro R. Artigues legas la nomojn de la premiitoj en la diversaj konkursoj. La gajnintino de la unua premio, buketo de naturaj florej, por poemo pri amo, estas S.-ino Marie Hankel el Dresden. Rektoro Boirac donas al ŝi la brakon, la muzikistaro ekludas triumfan marŝon, kaj sekvate de kvar brilevestitaj urbogvardianoj, S.-ino Hankel je bruegaj aplaŭdoj de l' ĉeestantaro solene entronigas kiel Reĝino de la Festo. S.-ro Chavet legas sian poemon, kiu ni donas apude. La granda salono nun farigas ŝia kortumo, kaj al ŝia majesta trono devas iri ĉiu premiito por ricevi sian premion. La duan premion de l' Unua Konkurso — proponitan de Svisa Espero —

gajnas Sviso mem, S.-ro Edmond Privat. La poeto legas mem sian belan, kortuſtantan verkon, kiu ni presigas sur ĉi tiuj pagoj. Laŭta ovacio salutas lin, kiam li ricevas de la regina mano sian premion. Poste estas disdonataj la premioj de l' ceteraj konkursoj, en nombro ĉirkaŭ kvardek. La premion de D-ro Zamenhof, por plej bela verketo pri "Regno de Homoj," konsistantan el lukse bindita kolekto de liaj verkoj, gajnis nia malnova fervora samideano S.-ro Llengyel Pal en Parizo. Inter la aliaj gajnintoj, rimarkindaj estis S.-ro Clarence Bicknell (anglo) kaj S.-ro Boucon (franco), kiuj ambaŭ estis multfoje premiitaj. La premio de la B.E., pro nesufiĉeco de konkurintoj, ne estis aljugita.

Kiam la disdonado estas finita, S.-ro Bourlet faras elokventan paroladon, kaj esprimas la esperon, ke ĉi tiu festo, ĉarma nova trajto de niaj Kongresoj, estos ĉiujare pli kaj pli sukcesa, kaj en bela maniero atestos pri la florado de nia Esperanta literaturo. Vivu Esperanto!

La urbestro diras: La festo estas fermita; kaj la kongresanoj, kunkantinte je ludado de l' muzikistaro la Esperantan himnon, malrapide forlasas la halon, tre kontentaj de ĉi tiu agrabla festo.

* Vespere, — aŭ pli ĝuste nokte, ĉar ĉiu koncerto en Barcelono komencigis je tre malfrua horo — en "El Bosque," teatro kie la aŭskultantaro sidas kvazati en la plena aero, ludigis katalune la opero "Lohengrin." La kanto, en kiu Lohengrin malkaſas sian nomon kaj hejmon, estas bele kantita Esperante. Oni ankaŭ dancis la baleton "Studento Parigini," kaj prezentis alegorion de Esperanto.

Pli frue en la vespero S.-ro Luis Carlos, sekretario de la "Internacia Ligo de la Esperantista Preslaboristaro," faris belan paroladon en la "Ateneu Barcelonés," dediĉitan al siaj samprofesianoj de la "Kataluna Instituto de la Presarto." La aŭdantaro konsistis grandparte el laboristoj Esperantistaj, versajne presartistoj kiel la paroladinto. D-ro Zamenhof prezidis la multenombre ĉeestatan kunvenon. Sur la estrado estis delegitoj preslaboristoj el 11 malsamaj landoj, kaj sur la unua vico sidis reprezentantoj de 13 hispanaj ĉiutagaj gazetoj. D-ro Zamenhof diras, ke li multe ŝatas, vidante laboristojn tiel multenombre ĉeesti, ĉar li vidas la grandan rolon, kiu en la estonto ludos la laboristaj asocioj por la antaŭenpuŝo de nia Esperanta entrepreno. Li ankaŭ tre ŝatas vidante, ke per Esperanto simplaj laboristoj sukcesis sin levi super sian staton, kaj finas, dankante tiujn, kiuj prenis sur sin la fondon de la Internacia Preslaborista Ligo, kaj admonante ĉiun koren ĝin subteni.

Poste S.-ro Carlos elokvente parolas pri la pli kaj pli rapida penetrado de Esperanto en la diversgentajn laboristajn rondojn. Li sciigas pri la bonegaj rezultatoj akiritaj de la Prestaborista Ligo Internacia jam post sesmonata funkciado: aligis 385 tipografistoj esperantistaj, 298 presejoj esperantaj, 17 fandejoj kaj fabrikejoj de kompostmaſinoj kun esperantaj matricoj.

Prof. Cart, honora vic-prezidanto de la Ligo, esprimas sian ŝaton, ke li povas partopreni tian demokratecan manifestadon laboristan.

Ni gratulas niajn presistajn amikojn pri la sukceso de tiu kunveno, kiu ankorat ĉiu fojon pruvis, ke Esperanto trovas favoran akcepton en la laboristaro. Ja rimarkinde kaj signifoplene ankaŭ estis, kiel ofte en Barcelono iu kongresano, promenante sur la strato, estas alparolata de kataluna laboristo, kiu deziris Esperantan Ŝlosilon, aŭ kiu, jam Esperantisto, deziris interŝangi samideanan saluton.

ĴAŪDON, LA 9AN.

Matene je la deka okazas en la *Paraninfo* de la Universitato Generala Agada Kunsido de la Kongreso, kun ĉeesto de eble 1,000 samideanoj. La Konstanta Komitato de l' Kongresoj prezentas projekton pri

starigo de oficiala reprezentantaro de l' Esperantistaro, finance subtenota de la diversaj societoj, por trakti kun la diversaj registroj, k.t.p., en okazo de bezono. Sekvis grava diskutado. Parolas por la projekto S-roj Chavet, Boirac, Decourt, Duvillard, k.a. Kontraŭ ĝi parolas S-ro Bobin, Mann, Blaise. Estis efektive bonega oratora batalado, kaj certe estus bone, se ĉiu skeptikulo pri la praktika valoro de nia lingvo povus ĉeesti, por vidi kiel flue kaj elokvente ĝi estas uzata de diverslingvuloj, kaj kiel facile ĝin komprenas granda diversnacia aŭskultantaro. Fine starigas S-ro Privat kaj diras en sia klara trafo maniero, ke se oni kontraŭ-parolas projekton, tio ne signifas, ke oni havas ian malamikan senton kontraŭ ĉi tiu aŭ alia aparta persono, sed nur malkonsenton principan. Li proponas, ke oni ne voĉdonu pri la jus prezentiĝita projekto sed nur decidu, pri kio ĉiuj povas konsenti. Poste S-ro Cart, kies eniron sur la katedron salutas kvazaŭ ovacio, petas ankaŭ ke oni ne decidu voĉdoni pri propono, kiun la kongresanoj ne povis antaŭe studi, sed presigu tekston sangitan laŭ la jusa diskutado, kaj ĝin disdonu al la kongresanoj antaŭ la proksima kunveno.

Posttagmeze, granda nombro da kongresanoj ekskuras al la bela Monto Tibidabo, kelkaj per la oportuna ŝnurervojo, aliaj piede laŭ peniga sed vigliga vojo apuda inter pitoreskaj rokoj kaj pinoj. Sur la supro oni havis belegan ĉirkauvidon sur vastan panoramon. Jen oriente kušas en la brila sunlumo la blanka domaro de Barcelono, la haveno kun ĝiaj sennombraj mastoj, la blua maro Mediteranea. De la alia flanko, okcidente, oni vidas la fantazian sombran silueton de Montserrat, maŭproksiman je 50 kilometroj. Dume, sur la placo apud la oportuna sed iom elspeziga restoracio, gejunuloj en rondo dancas ritmajn katalunajn dancojn, kaj ankaŭ la Esperantan Rondon aranĝitan de kataluna samideanoj S-roj R. Todo y Duran kaj L. Botej. Tiu lasta danco, tre interesa kaj vigliga, verkita laŭ pireneaj popolaj arioj kaj dancoj, sendube baldaŭ akiras mondian famon, kaj farigos trajto neforlaseblia ĉe ĉiuj amikecaj kunvenoj Esperantistaj. Sed oni ne povos, ho ve! transporti en tiujn kunvenojn la belegan scenejon de Tibidabo, nek la misterajn plendajn sonojn de l' katalunaj muzikinstrumentoj, kiuj tie supre inter la montoj donis al la danco ian nedireble logan ĉarmon.

Jaŭdo estis la tago dediĉita al la prezентado de "Mistero de Doloro," esperanten tradukita de S-ro Pujulà el la kataluna de S-ro Adria Gual. Je la 9a kaj duono vespere do la Teatro Romea, bele ornamita per Esperantaj kaj naciaj flagoj kaj florgirlandoj, estis plenplena de festobrile vestita gesamideanaro, plej vive interbabilanta pri la diversaj agrablaĵoj spertoj de la tago. La programo komencigas per parolado Esperanta de la verkinto mem de la dramo ludota. Tiun paroladon prezantis tamen ne S-ro Gual, sed Profesoro Bourlet, kiu diris, ke la aŭtoro, kvankam ĉeestanta kaj sufice bone scianta nian lingvon, pro modesteco ne kuragus mem ĝin legi.

La prezентado de la tragedio estis lertege farita de profesiaj katalunaj aktoroj, S-roj C. Capdevilla (Silvestro), S-ino Emilia Baró (Marianeto), S-ino Antonia Baró (Mariano), S-ro C. Urbez (Filo Labast), kaj S-ro M. Sirvent (Malest). La rapida, plej drameca agado, nature kaj vivoplene interpretata laŭ vera intensa sudana maniero, firme tenis ĉies atenton ĝis la kurtiĝanta fino, kaj je l' falo de l' kurteno tondra ovacio salutis la ludintojn. Floroj kaj girlandoj de ŝirigis de l' galerioj kaj ĵetigis sur la scenejon, oni alvokis la aŭtoron, kiu inter la senfinaj aplaŭdoj devis ĉirkauiri supren kun la geaktoroj por ricevi la manpremon de l' Majstro kaj lia edzino. Alia frapanta pruvo pri la mirinda taŭgeco de Esperanto por la dramo! Kiam fine iu kuragulo entreprenos organizi internacian teatron?

En la sama vespero estis sciigita, ke la Urbestraro voĉdonis kvin mil pesetojn (£200) por oficiale adiati la kongresanojn sabate.

VENDREDON, LA 10AN.

Diversaj specialistaj kunvenoj okazis matene: de Maristoj, Fervojistoj, Katolikoj, Kuracistoj, Instruistoj (pli ol 100 ĉeestis sub la prezido de S-ro Chelmot).

Plej grava estis la solena kunveno de la Internacia Scienca Asocio, prezidita de Generalo Sébert. Post kasista raporto de S-ro Renard, S-ro R. de Saussure faris rimarkindan kaj tre interesan raporton pri la laboroj de la Scienca Asocio pri la starigo de la teknikaj vortaroj. Li diris, ke post la sperto kaj provado de la dujara laboro oni venis al la konkludo, ke la sola praktika maniero starigi tiujn vortarojn, estas fari kiel oni faras por la ordinara ne-teknika vortaro, ĉerpi la vortojn laŭ aperado el la sciencia literaturo mem. Kun tiu celo oni do kreis du Komisionojn: unu Akademian, kiu ekzamenas kaj elektas inter la jam uzitaj sciencaj vortoj, por oficialigi la plej bonajn; la alian Tehnikan, kiu proponas novajn vortarojn por la diversaj sciencoj kaj donas konsiliojn kaj regulojn por gvidi la farantojn de novaj vortoj.

En la nomo de la tuta Asocio, Generalo Sébert esprimas al S-ro de Saussure ĝiajn unuanimajn dankojn pro lia senlaca laborado kaj granda malavareco.

Kiel nova komitato de l' Asocio elektiĝis: Prezidanto, Prof. Ed. Huntingdon (Harvard Universitato, U.S.A.); vic-prezidantoj, Generalo Sébert (ano de l' Akademio de Sciencoj, Parizo), Prof. Köppen (Cefmeteoroologo de l' nacia marobservejo en Hamburgo), Prof. Villareal (Rektoro de la Lima Universitato, Peru); generala sekretario, S-ro R. de Saussure (P.D. en la Geneva Universitato).

Posttagmeze okazis en la Parko vetkurado de motocikletoj kaj bicikloj. Unu el la premioj, por bicikla kurado, estis bela "Pokalo Esperanta." Inter la jugantaro sidis D-ro Zamenhof kun sia edzino, Ges-roj Pujulà, k.a. Sep konkurantoj disputis la Esperantan Pokalon, kiun gajnis fine S-ro Aparg, je entuziasma aklamado de multenombra publiko.

Vespere multaj kongresanoj kunvenis lati invito en la ĝardeno de l' Belarto, por festi la 20-jarigon de nia konata amiko S-ro Edmond Privat. Toastis lin la Majstro, Prof. Cart (lia Esperanta "patreto"), Baronino de Ménil, Sia Regina Mosto Marie Hankel, Abato Richardson, S-roj Clarence Bicknell, Moscheles kaj Mudie, kaj lia longatempa kamarado Hodler.

Poste, en la sidejo de la Kataluna Vegetarana Ligo, okazis festo je l' honoro de D-ro Zamenhof kaj kelkaj kongresanoj vegetaranaj. Prezidis D-ro Falp, prezidanto de la Ligo, kaj paroladis Esperante pri Esperanto, Vegetarismo kaj Patrujo. D-ro Palejà sekretario de la Ligo, ankaŭ raportis pri la progreso de Vegetarismo en Hispanujo. Poste oni nomis honoraj membroj de la Ligo D-ron Zamenhof, kaj S-rojn Mann kaj Ladéveze (kiel sekretariojn de la Int. Unuiĝo de Esp. Vegetaranoj). D-ro Zamenhof, dankante, diris ke Esperantismo havas multon komunan kun Vegetarismo, kaj ke li mem certe vivus vegetare, se tion ne malpermis la malfacileco ricevi la necesajn nutraĵojn en Varsovio. Sekvis la "Himno Vegetariana," bele ludata kaj kantata de Fino E. Gallinat. Bongusta frukta vespermanĝeto finis la festeton.

Poste okazis la granda Kongresa Balo en la Palaco de l' Belarto. La plejparto de l' programo konsistis el katalunaj dancoj, gracie prezentitaj de gejunulej pitoreske vestitaj en naciaj kostumoj. Oni dancis ankaŭ la multe ŝatatan "Rondon Esperantan."

SABATON, LA 11AN.

Ĉi tiun matenon, la lastan de la Kongreso, denove kunvenis en la Universitato multaj specialistoj: Vege-

taranoj, Publicistoj, Stenografiistoj, Ruĝkruculoj, Scienculoj, Stataj Oficistoj, k.a.

Je la 11-a komencigis la tria kaj lasta Agada Kunsido Generala, en la *Paraninfo*. D-ro Zamenhof prezidis.

S-ro Chavet, generala sekretario, legas la protokolojn de la antaŭaj kunvenoj. Ili estas aprobitaj. Li anoncas, ke la proksimuma nombro de la kongresanoj estas 1,300.

Rektoro Boirac, prezidanto de la Akademio kaj de la Lingva Komitato, prezenti raporton pri la laboro de tiuj du institucioj dum la pasinta jaro. Li diris, ke la Akademio dum ĉi tiu jaro serioze ekzamenis diversajn proponojn pri reformoj al la lingvo, pri kiuj la aŭtoroj pretendis, ke ili estas konformaj al la fundamentaj principoj de Esperanto. Oni ne plu povas diradi, ke la Akademio ne esploris la reformoproponojn. Oni nun metis kvazaŭ la tutan lingvon sur la tablon por zorga ekzameno, kaj la rezultato estis, ke post interdiskutado kaj voĉdonado, tiuj proponoj estis definitive malakceptitaj de la Akademio unu fojon por ĉiam. La Akademio deklaris, ke ilin ĝi ne ekzamenos plu. Esperanto estas nun vivanta lingvo, kiu evolicias malrapide kaj nature tute simile kiel la naciaj lingvoj. Jam neniu en la mondo povas ĝin arbitre tuvi. La Akademio ankaŭ ekzamenis proponojn pri aldonon oficiala de novaj afiksoj (-iz, -oz, -iv, k.t.p.), kaj voĉdone decidis, ke ilin ĝi ne povas akcepti en la komunan lingvon, sed povas aprobi ilian uzon nur en la sciencia kaj teknika lingvo, el kiu ili iom post iom ensoviĝos en la komunan, se ili montrigos bezonataj.

Li diris, ke la Lingva Komitato, kiu kunvenis kvarfoje dum la Kongreso, aŭdis raportojn de la fakestroj de la Akademio: de S-ro Grabowski pri gramatiko, de Prof. Cart pri la komuna vortaro, kaj de S-ro de Saussure pri la teknika vortaro. La raportintoj pri vortaro trafis ambaŭ unu saman konkludon, nome ke la sola bona metodo por oficialigi novajn vortojn, ĉu ili estas teknikaj aŭ ne-teknikaj, estas fari elekton inter la neologismoj *jam uzitaj* de l' plej bonaj verkistoj en la komuna literaturo. Jam la Akademio tiel faris liston de 800 novaj vortoj kiel aldonon al la "Universala Vortaro."

G-alo Sébert raportas pri la loko de Sesa Kongreso. Ĉar la Amerikanoj bonvole forlasis sian intencion pri Kongreso en Chautauqua la nunan jaron antaŭ la Barcelona, oni devos nepre akcepti ilian inviton por la sekonta jaro. La Belgoj diris, ke ili volonte atendos ĝis 1911, por okazigi la Sepan Kongreson.

S-ro Reed, oficiala delegito de la Usona Registaro, invitas la Ses-an Kongreson al Washington por 1910, kaj S-ro Van der Biest, delegito de la Belga Registaro, invitas la Sesan al Antverpeno. Per lauta aklamado ambaŭ invitoj estas akceptitaj unuanime.

La kunveno, tagmeze interrompita, komencigas denove je la 3a.

La antaŭe diskutita projekto de la Konstanta Komisio, pri centra reprezentantaro, nun forlasita, estas anstataŭigita per la jam disdonita teksto proponita de S-ro Privat, kiu oni unuanime akceptas, jene:

"La Kvina Kongreso de Esperanto esprimas la deziron, ke la naciaj societoj por la propagando de Esperanto kre per propria balotado internacion konsilantaron, kiu zorgos pri la financaj rimedoj de niaj oficialaj institucioj (Lingva Komitato kaj Kongresa Komitato de l' Kongresoj). Oni elektos la konsilantojn po unu por mil anoj de propagandaj societoj."

D-ro Dor proponas, ke oni petu por D-ro Zamenhof la Premion Nobel. D-ro Zamenhof petas, ke oni tiun proponon ne akceptu.

S-ro Keating, delegito de Brazilujo, sciigas, ke laŭ letero ĵus ricevita de li el Rio de Janeiro, la sesa Kongreso de Kuracistroj, antaŭenlonge okazinta en tiu urbo, akceptis Esperanton kiel oficialan kongreslingvon.

S-ro Chavet legas la diversajn propoziciojn aprobitajn dum la Kongreso, kaj sciigas, ke estas reprezentitaj en la Kongreso 33 diversaj nacioj.

S-ino Rebours de Pujulà, la energia sekretariino de la Kongreso, petas aplaŭdon por la urbaj gvardianoj, kiuj scias Esperanton, kaj diras en la nomo de la gvardiestro, ke ĉiuj gvardianoj nepre lernos la lingvon.

Prof. Carlo Bourlet faras paroladon pri la bonegaj rezultatoj atingitaj de la Kongreso, kiun karakterizis precipite la unuanimeco, paceco de diskutado kaj en la fino plena interkonsento de ĉiuj Esperantistoj. En la nomo de ĉiuj li dankas tutkore la lokan Kongresan Komitaton, dank' al kies senlaeca klopoado nia ĉiujara festo tiel brile sukcesis.

S-ro Pujulà levigas por respondi, ke sukcesigis la Kongreson ne la komitato, sed la alvenintoj, kaj ankaŭ la granda helpe donita de la urbaj kaj provincaj aŭtoritatoj.

D-ro Zamenhof per mallonga parolado fermas la Kongreson. Li diras, ke niaj kunvenoj denove montris la vivantecon de nia lingvo, kaj li rimarkigis, ke kelkaj hispanaj gazetoj, kiuj antaŭe staris moke kontraŭ nia afero, nun konfesis sian eraron kaj farigis aprobantoj de Esperanto.

Poste longa aplaŭdado, ĉiuj starante kunkantas "La Espero," kaj inter laŭtaj vivukrioj finigas unu plua plensukcesa manifestacio tutmonda.

Restas nun nur la oficiala adiaŭa festo, organizita de la urbo.

Vespere, la urbo akceptas adiaŭdire la tutan kongresanaron, aŭ almenaŭ tiujn, kiuj ankoraŭ restis en la urbo. Kun multaj geurbanoj, tiuj kongresanoj plenigas la grandan salonegon en la Palaco de l' Belarto, belege ornamitan per floroj kaj kreskajoj. Tien baldaŭ venas ankaŭ la urbestro kun multaj urbkonsilantoj, kaj iliaj Moštoj S-roj Kapitano Generala, la Provincestro, la Prezidento de la Provinca Deputitaro kaj aliaj eminentuloj. Je dolĉaj harmonioj ludataj per la grandega elektra orgeno oni estas regalata per delikata "lunco," kaj la "honora vino." Dum la vespero longa procesio da gekongresanoj iras sur la estradon por persone saluti la urbestron kaj la Majstron. Gis la revido! kaj jen ĉiuj disigas, nepre iom malgojaj pri la finigo de nia granda festo familia...

KELKAY KRITIKETOJ.

Antaŭ ol fini, oni al ni permesu fari kelkajn kritiketojn, tute ne riproĉojn al la fervorege laborintaj organizintoj de la Kongreso, sed nur kelkajn rimarketojn pri punktoj observitaj de ni kaj de amikoj, por ke se eble oni evitu ilin e ĝi venontaj Kongresoj. Ili estas tre malmultaj! Unue, ŝajnis al li bedaŭrinde, ke ne estis sufice da tempo kaj okazoj por komuna kunesto por amika interabilado neoficiala. Oni ja estis kune en la diversaj generalaj kunsidoj, kaj en la koncertoj, sed tuj post ilia finigo oni devis forkuri ĉiu al sia hotelo, kie oni logis po malgrandaj rondetoj kvazaŭ tute aparte de la ceteraj kongresanoj. En Dresdeno, kaj speciale en Cambridge, oni ĉe la komunaj mangotabloj havis tre agrablajn okazojn por kunestado. Ni scias, ke la hotelaj kutimoj en Barcelono tre malfaciligis la aranĝon de io tia, sed sen ĝi, ni kredas ke Kongreso nepre perdas multe da tiu demokrata familia sento, kiu estas tiel ĉarma trajto de nia movado. Espereble en Washington oni povos pli atenti tiun punkton.

Alia punkto estis, ke en multaj kunvenoj, nur la plej proksimaj povis audi la plejmultajn oratorojn. Ekzemple, ĉe la Festo de la Floraj Ludoj, tre malmultaj el la aŭskultantoj en la flankaj navoj povis distingi la vortojn eldiratajn sur la tribuno. Ankaŭ en la Palaco de l' Belarto kaj eĉ en la Paraninfo de la Universitato estis same.

Plue, ni scias, ke multaj kongresanoj, kvankam ili tre, tre ĝuis la belajn dancojn de la Katalunoj en la

bala vespero, ankaŭ tre, tre multe bedaŭris, ke ne estis pli da dancoj por la Esperantistoj mem. En tiu vidpunkto, la balo ne estis kongresa balo internacia, sed pli ĝuste elmonstro de naciaj dancoj. *Internacieco*, kaj ne nacieco, ĉu ne, devus karakterizi niajn kongresajn festojn?

Oni pardonu tiujn malmultajn vortojn pri punktoj, kiuj tamen neniel malhelpis, ke la Kvina, kiel ĉiu antaŭa Kongreso, estis plena sukceso!

LASTAJ VORTOJ.

Nu, finigis nia longa raporto, kaj tamen ŝajnis, ke ni preskaŭ nenion diris. Tiom multe da aferoj en Kongreso, la personaj intimaj spertetoj, la promenadoj, ekskursetoj, interparoladoj kun malnovaj amikoj, kiuj tamen vivigas la kongresan tempon en la memoro, estas nepriskribebla en generala raporto, sed ili ne estas la malplej grava parto de l' farado. Nek povas esti ĉi tie priskribataj la bonegaj ekskursoj, kiujn partoprenis multaj post la Kongreso : la ekskursado al tiu mirinda loko Montserrat, la logado en la monasterio tie, la ĉarmegaj monto-grimpadoj kaj promenadoj, la neforgeseblaj spektakloj de sunlevigoj kaj sunsubiroj ; la korega akceptado en Valencio ; la agrabla marveturado ĝis la Insuloj Balearaj kaj Alĝerio ; la dolĉaj tagoj de ripozo en vilagoj Vilasar kaj Sitges apud la bluiga Mediteraneo ; la saniga marbanado, remado, velveturado, la sudlanda arbaro kaj fruktaro, donanta al la pejzaĝo aspekton tute apartan, la gaia gastama popolo, tiel kompleza por helpi kaj servi — tion ni ne povas detale priskribi, sed ĉio ĉi tio restas en nia spirito, ravanta memoro por gajigi nin dum la grizaj tagoj de longa nordlanda vintro, kiu, ho ve! en nia lando ŝajne jam komencigis.

W. MANN.



Poemoj Kronitaj en la Floraj Ludoj Esperantistaj de Barcelono.

La Simbolo de l' Amo.

Rozujo sovaga, simbolo de l' amo,
En vintro vi staras sen ia ornamo!
En kampo vi nuda ĉagrenas dezerte,
Rozujo, malvarmo mortigos vin certe.

Mallaŭte tre dolĉa voĉeto elsonas :
“ Silentu, silentu, mi dormon bezonas,
Min nutras denove patrino la tero,
Pacienco atendas mi ĝis la somero.”

Dormantan rozujon printempo vekigis,
Somero ĝin riĉe kaj bele florigis.
Ho, donu al mi nun kroneton belfloran,
Girlandon balancan kaj brilekoloran !

“ Ne tuſu, ne ŝiru floraron, ja mian,
Mi pikos, mi vundos la manon, la vian,
Pro amo mi miajn floretojn defendos,
Pro amo mi miajn pikalojn forsendos.”

Al vento ĝi florofoliojn oferis,
Aŭtune la fruktoj fiere aperis :
Rozujo, simbolo de l' amo vi restas,
Pacienco, alloga, kuraga vi estas.

MARIE HANKEL,

Regno de la Festo.

Sur Vojo de l' Vivo.

I.

Sur vojo de l' vivo vaginte tre sola
Dum jaroj bruemaj de l' knaba juneco,
Kaj multe plorinte sen vorto konsola
Dum sonis ridad' el apuda gajeco,
Tagon mi renkontis voje
La rigardon de princino.
Tuſis mian manon foje
Dolĉa mano de fratino.

La manon mi kaptis kaj premis tremante.
El miaj okuloj Ŝi plorojn ĉesigis,
Kaj sulkojn de l' frunto forigis kisante.
Ni manon en mano la vojon datrigis.
Blue brilis la ĉielo ;
Cie floris la ĝardenoj.
Por la haroj de l' angelo
Kreskis rozoj kaj jasmenoj.

Sur vojo de l' vivo nun dolĉa kaj bela
Ni, kvazaŭ du cignoj sur blua rivero,
Malpeze glitadis al revo ĉela,
Dum harpoj kantadis pri l' ama mistero.
Pura Ŝajnis tutu mondo,
Bona ĉiu, bela ĉio.
Cirkau ni dancadis rondo
De petaloj el lilio.

Ni revon mirindan komencis sen limo
Pri lando eterna de paco kaj gojo ;
Kaj kanton de nia komuna animo
Plej pure Ŝi ritmis laulunge de l' vojo.
Niajn rozojn Ŝi disdonis
Al malgajaj vojirantoj,
Kaj infanojn ofte kronis
Per kronetoj el diantoj.

II.

Sur vojo de l' vivo nun vagas mi sola,
Nezorge al kie la tempo min blevas ;
Car, kvankam min celus eĉ vorto konsola,
En ago la nuna mi vivi ne povas :
Haltis mia koro voje
E la tombo de l' princino,
Kiu donis al mi foje
Dolĉan manon de fratino.

La tagon, en kiu Ŝi haltis kun larmo
Kaj blankan la manon forſiris el mia,
Mi kial ne povis en morta malvarmo
Sin sekvi sub teron al tombo glacia ?
For de l' tomb' en nuna horo,
Min disrompas per tirado
Malantaŭen rememoro,
Kaj antaŭen plu-vivado.

Sur vojo de l' vivo, pro kia mistero
Eĉ amo nur estas pruntao momenta ;
Cielon ni trovas kaj perdas sur tero ;
Kaj blevas ankoraŭ la tempo turmenta.
Tamen ĉesu pliendo mia,
Se antaŭen vokas devo.

Kantu harpo melodio
Pri la land' de ma revo ;

Car iam ni revon komencis sen limo
Pri lando eterna de paco kaj gojo ;
Sed kanto de nia komuna animo
Kun voĉo karega perdigis sur vojo.
Kaj vagadas nun fantome.
Mi, kun floroj en la mano
Por disporti Ŝianome
Al laculoj kaj infanoj.

EDMOND PRIVAT.

Antaŭkongresa Propaganda Vojago.

Iri aŭ ne iri? Tiel staris jam la demando kaj multaj vojaĝavidaj gesamideanoj insiste proponis al si la demandon.

Malgajaj raportoj pri politikaj okazintajoj forprenis la kuragon. Kion fari oni nesciis, kaj la mostularo skribis al mi, por demandi ĉu mi aprobas kunsidon en Toulouse aŭ Parizo, ĉar estos neeble alveturi Barcelono. Tuj mi respondis, ke la honoro estas al Hispanujo kaj ne al Francujo fari Kongreson tiun ĉi jaron, kaj ke post kvin tagoj mi ekforveturos Barcelonon. Plue, mi certigas, ke la Esperantistoj devos serĉi tre pligrandigajn okulvitrojn, se ili deziras eltrovi malagrablaĵojn en Esperantujo.

Tiu vojago serioze klopodigis mian cerbon jam deposit Dresdeno.

Almenaŭ deko da irmanieroj, ĉiu pli agrabla ol ĝia antaŭulo, prezentis sin al mia vojagema mento. (Cu "menso" ankoraŭ?)

Tiam, je malfeliĉa momento, mi komencis legi *Baedeker* — la plej modernan eldonon — kaj preskaŭ perdis mian kutiman kuragon.

Laŭ la informoj, kiujn mi elcerpis el tiu rimarkinda volumo kaj aliaj samspecaj, mi eksciis, ke oni friponos, maldormigos, malsanigos, erarigos, rabos, k.t.p., k.t.p., ĝis la malfeliĉa turisto volos, ke li neniam estis naskiginta. Kompreneble post tio, estis tute neeble al mi klopodi pri Karavano. Ne estus agrable forlasi Esperantianajn kadavrojn en ĉiu vizitita urbaço. Do senreklame mi kaſe enmetis simpian anonceton en nia kara *B.E.* por certigi, ke almenaŭ unu Esperantisto forlasos Liverpool je Augusto 14, por trafi Lisabonon, kaj de tie alveturi la urbon de la Kvina, kaj ke tiu estos kontenta renkonti kunvojagontojn.

Jen kiel okazis ke, tra sufice densa nebulo, la bela ŝipego "Hilary" — la plej luksa ŝipo sur kiu mi ĝis nun vojaĝis — portis tri kuragplenaĝajn geesperantistojn laŭlonge de la bela Kimra kaj Okcidentangla marbordo ĝis tiu memorinda Esperantujeto, *Le Havre*.

Post tre agrabla vizito al la tieaj samideanoj, kaj post ekskurseto al vivoplena *Trouville*, ni daŭrigis propagandi inter la diversnaciaj ŝipanoj ĝis alveno en Oporto. Efektive ni haltis ankau en Vigo, sed mankis la tempo por viziti tiun belegan urbon.

Cu miaj legantoj iam propagandis sur ŝipo? Se jes, ili konstatis kun mi, ke nenie oni trovas pli simpatian audiataron. La maro mem, kaj la oftaj haltoj en diverslingvaj havenoj ja devigas, ke oni pripensu la naciecon kaj la internaciecon: kunigilojn kaj disigilojn. Tio okazas ĉe ŝipanaro ununacia. Tiom pli do okazas tio ĉe ŝipanaro kunmetita el membroj de ses aŭ sep nacioj kaj lingvoj.

Kelkajoje okazis ke, por plej bone trafi la propagandon, mi devis en unu duonhoro balbuti france, germane, itale, hispane kaj — kio tiam estis al mi preskaŭ neebla — portugale.

Kaj kiam naciaj vortoj mankis al mi, la Esperantaj vortoj preskaŭ ĉiam savis por nia afero la situacion. Multaj Brazilanoj promesis serioze studi Esperanton, kaj certe nia vojago tra belega Portugalujo ne malhelpis nian aferon. Kelkajn centojn da Ĉefecaj ŝlosiloj ni dissemis dum la vojago. Eble kelkaj falis sur tre Ŝtonoza* tero, sed neeble estas, ke ne eĉ unu fruktoportos.

Jam de la unua minuto sur la Duoninsulo, prosperis al ni iom taksi la malverecon de la malafablaj gvidlibroj. Cio plăcis, kaj eĉ la almozpetantoj estis ridemaj kaj kondiĉe, ke oni neniam donu al ili ion — tute ne plu trudis post unu sola eksperimento je nia kortusebleco. Pri la pejzagoj traveturitaj, pri la mangoj laŭ nacia kuirsistemo, ne estus bone, ke mi nun skribu. Alie vi

tuj forlasus vian okupadon, kaj forveturus Portugalujon. Sufiĉas ke mi certigas al vi, ke tiu, kiu neniam vizitis tiun landon, ne vidis ĉion, kio estas bona kaj bela en la mondo.

En Cintra ni havis la okazon vidi la regan familon, kiu tie faras sian someran logadon en la belega palaco *La Pena*, kiu ŝajne regas la mondon, tiel alte kaj majeste ĝi tie staras sur sia monta roko. Grandan propagandon ni faris, kaj inter aliaj, havis la plezuron doni ŝlosilojn al korteganoj de la reĝo kaj reĝpatrino.

Ofte la "barbaroj" nin demandas, ĉu Esperanto ĝi utilas al ni dum vojago? Karaj samideanoj, neniam ŝanceligu pro tio! Eĉ se vi ne trovos portantojn de la verda stelo, kun kiuj vi povos babilii, vi ĉiam trovos, ke la ŝlosilo de Ĉefec provizas veran ŝlosilon al la koroj de la homoj. Esperanto efikas mirinde kiel prezento. Tuj je la ekkonatigo vi posedas temon tre interesan por komenci vian interparoladon, kaj se post unu aŭ du horoj da tiel komencita babilado vi ne varmigos la koron de via novetrovita najbaro, la kulpo nek apartenas al Esperanto, nek al amiko Ĉefec — nur al Vi!

De Lisabono ni traveturis la landon nordorienten ĝis *La Guarda* en la altaj *Estrella*-montoj, kie en vintro lupoj celas la ŝafojn en sirmataj valoj paštantajn. Enirinte Hispanujon ĉe Ciudad Rodrigo, multaj detaloj de la lando, enlogantoj, mangoj, ŝajne subite ŝangiĝas, sed ĉio estas ankoraŭ tute kontentiga kaj tre feliĉa estis tiu kuraga Esperantista bandeto, kiu daŭrigadis la Ĉefecdisdonadon — nur oni ŝangiĝis la lingvon. La antikva kaj bela katedralo kaj universitato de Salamanca donis interesan ideon pri la mezepoka Hispanujo, sed la hoteloj kaj speciale la hotelkelneroj kaj "varbistoj" estis tute — preskaŭ tro — modernaj. Neniam prosperis al mi kompreni, kial oni insistis kredigas, ke Hispanujo ĉiam dorsas, ke ĉio estas mezepoka ankoraŭ tie. Lan multaj rhatoj Hispanujo povas montri la vicon al nacioj, kiuj guas pli antaŭeman reputacion.

Eti rimarkinda *Segovia*, kun ĝia katedralo kaj akvokonduki, ni vizitis la regan palacon de *La Granja San Ildefonso*, kie ni ne nur havis la plezuron trovi Esperantiston kiel estron de la regaj oficejoj, sed eĉ estis invititaj viziti la palacon mem, kiun ordinare oni ne malfermas al la publiko. Ni sidas ekstere, kiam la ĉirkauisidantaj elegantuloj subite starigis kaj kisis la manon al eminenta kaj distinginda sinjorino. Nekonte ŝin, ni sidadis atendante nenion, sed la sinjorino, kiu efektive estas la Infanta Isabella, venis al ni, multe parolis kun ni — dum, kompreneble, la Esperanta temo ne estis forgesata — kaj tre afable invitis nin en la palacon. Rekompence sia Princino Mosto nun posedas belan Esperantan lernolibron, kiel ankoraŭ la Portugalaj eminentuloj!

Felika sorte ŝajne ĉiam gardestaros apud nia gefrataro. Unu tagon, veturnante de Toledo al Madrid, ege grandega ŝalego da pluvo forportis tri kilometrojn de la fervojo, kaj ni devis halti kvin horojn en malgranda stacidomo ĝis ni ricevis permeson reveni kaj diri alian vojon. Sed jen! stranga felico! La Kembriga kongresano Kolonelo Ayza hazarde trovigis en la sama wagonaro, kaj ĉe mia instigo, afable konsentis alparoli la kolektigintajn interesitulojn pri nia kara lingvo, nia historio kaj tiel plu. Oni raportis tiun strangan kunsidon en multaj Madridaj kaj Valenciaj jurnaloj, je la profito de nia propagando.

Fine ni prenis nian kuragon en mano, kaj eniris vagonon de la tria klaso, por povi lati efektiva sperto kritiki la gvidlibrojn, kiuj diras, ke tiu estas neeblaĵo por fremduloj. Timante nekomfortecon, ni nur prenis biletojn por ok-hora veturnado, sed tiom ni estis komfortaj, ke ni daŭrigis por sinsekva plua okhoraĵo, kaj tute freše trafilis Kongresujon.

Finante, mi nur diru, ke mia vojago estis longa je 3,725 mejloj (k. 5,960) kaj ke ĉiu mejlo reprezentas almenaŭ dekdu minutojn da nemakulta kontentigo.

H. B. M.

* Proponita sufikso por multaj multnombrécen.

Fabeloj.

De WILHELM HAUFF.

*El germana lingvo tradukis J. W. EGGLERON.
(Sekvo.)*

Jam atingis la karavano la finon de la dezerto, kaj goje la vojagantoj salutis la verdajn herbejojn kaj la folioričajn arbojn, kies ĉarma vidajo jam de multaj tagoj ne trafis iliajn okulojn. En bela valo kuſis karavanejo, kiun ili elektis kiel noktan restadejon; kaj kvankam ĝi prezantis nur malmulte da komforto kaj refreſigo, tamen la tuta vojagantaro estis pli gaja kaj interamikigema ol antaue, ĉar la penso, ke ili nun elsvigis el la dangeroj kaj malagrabloj, kiujn okazigas vojago tra la dezerto, malfermis ĉiujn korojn kaj inklinis ĉies spiriton al ŝercado kaj amuzigado. Mulej, la juna gaja komercisto, dancis dancon ridigan, ĝin akompanante per kantoj, kiuj eĉ de la seriozema greko Zaleūkos ellogis rideton. Sed, ne kontenta de tio, ke li gajgis siajn kunvojagantojn per ludo kaj danco, li volis ankaŭ rakonti al ili la historion, kiun li jam antaue promesis; kaj, iom mallaciiginte post sia saltado, li ekparolis latijene:—

La Historio pri Malgranda Muk.

En Niceo, mia kara naskurbo, logis iam homo, kiun oni nomis Malgranda Muk. Kvankam mi estis tiam tre junia, mi ankoraŭ memoras lin bone, precipite pro tio, ke estas li, al kiu mi dankas la teruran bastonadon, per kiu regalis min foje mia patro. Kiam mi konatigis kun li, li estis jam grandagulo; tamen li havis nur tri aŭ kvar ŝojojn da alto. Krom tio, li havis eksterajon tre strangan; ĉar lia korpo, kvankam malgranda kaj delikata, devis porti kapon multe pli grandan kaj pli dikon, ol la kapo de ordinara mortemulo. Li logis tute sola en grada domo: eĉ sian kuiradon li faradis propramane. Nur unu fojon en kvar semajnoj li iradis promeni; kaj nur la fuma kolonego, kiu ĉutagmeze supreniris el lia kameno, scigadis al liaj samurbanoj, ĉu li vivas aŭ mortis. Oni ofte lin vidis vespere tien kaj reen irantan supre sur lia domo, kaj tiama suprenrigardante de sur la strato, oni povis tre bone imagi al si, ke sola lia granda kapo ĉirkaukuradas sur la tegmento. Mi kaj miaj ludkamaradoj estis senkompataj petoluloj, kiuj ŝojis moki kaj kolerigeti aliajn; sekve, ĉufoje kiam Malgranda Muk eliris promeni, tio estis por ni vera festokazo. En la difinita tago ni kolektigadis antaue lia domo, por tie atendi, ĝis li elvenos; kaj fine, kiam malfermis la pordo kaj elrigardis unue la granda kapo kun la ankoraŭ pli granda turbano, kiam postvenis la cetera korpeto, vestita per eluzita manteleto, vasta pantalono kaj larga zono, ĉe kiu pendis longa ponardo, — tiel longa, ke oni ne sciis, ĉu Muk alkrociĝas al la ponardo aŭ la ponardo al Muk,— kiam li tiel eliris el la domo, ekbruis la aero pro nia ŝoja kriado, ni jetis supren niain ĉapojn kaj ekdancis ĉirkaŭ li kiel frenezaj. Siavice, Malgranda Muk faris al ni seriozan kapsaluton kaj, per malrapidaj paſoj, ekmarŝis tra la strato. Survoje li trenadis iom la piedojn, ĉar li surhavis grandajn, largajn pantoflojn, kiajn mi neniam vidis antaue. Ni infanoj kuradis post li, kriante senĉese: "Malgranda Muk, Malgranda Muk!" Ni ankaŭ havis gajan versajeton, kiun ni kantis iufoje pro lia honoro; jen ĝia teksto:

"Muk, Muk, Malgranda Muk!

Logas vi en grada domo;
Estas brava eta homo;
Unu fojon en monato
Promenadas sur la strato;
Grandkapulo, turnu vin!
Kuru, Muk, kaj kaptu nin!"

Tiamaniere ni jam ofte amuzigis, kaj kun honto mi

devas konfesi, ke la plej forte incitadis lin mi, ĉar ofte mi ektiris lin je lia manteleto, kaj foje mi de malantaue metis la piedon sur lian grandan pantoflon, ke li falis sur la vizagon. Unuamomento mi trovis tion ekstrema ridinda; sed ĉesis mia ridado, kiam mi rimarkis, ke Malgranda Muk sin direktas al la domo de mia patro. Kaj efektive, jen li tien eniris, kaj sufice longan tempon li tie restis. Mi kaſis min proksime de l' pordo, kaj vidis lin reeliri en akompano de mia patro, kiu tre respektoplene lin tenis je la mano kaj, multfoje klinigante, adiaŭis ĉe la pordo. Al mi estis ne tute trankvile en la koro, kaj longatempe mi restis en mia kaſeo. Sed fine elpelis min la malsato, kiun mi timis multe pli, ol batojn; kaj humila, kun klinita kapo, mi aperis antaue mia patro. "Mi aŭdis, ke vi ofendis la bonan Muk'on," li parolis, per tono tre serioza; "nu, mi nun rakontos al vi la historion de tiu ĉi Muk, ĉar mi ne dubas, ke, kiam ĝi estos de vi konata, vi jam ne ridos lin plu. Sed antaue kaj post la rakonto vi devos ricevi la *kutiman*." La "kutima" estis dudek kvin batoj, kiujn li ĉiam tre kaj tre konscience elkalkuladis sur mia dorso. Li do prenis sian longan pipetbon, deſratibis ĝian sukcenan buſpecon kaj prilaboris min pli senindulge ol iam antaue. Kiam la dudek kvin estis plennombre pagitaj, li ordonis al mi atenti kaj ektakontis la historion pri Malgranda Muk.

La patro de Malgranda Muk, kies ŝusta nomo estas Mukra, estis respektata, sed malriĉa homo, ĉi tie en Niceo. Li vivis preskaŭ tiel same ermite, kiel nuntempe lia filo. Tiun ĉi li tute ne amis, ĉar li hontis lian pigmean staturon, kaj tial li lasis lin pliagigi en grada sensieco. Ankoraŭ en sia dek-sesa jaro Malgranda Muk estis facilanima infano; kaj la patro, homo serioza, ne ĉesis lin riprochi, ke li, kiu jam de longe ne plu devus porti siajn ŝojojn de infano, estas ankoraŭ tiel naivega kaj malsprita.

Sed okazis foje, ke la maljunulo falis ĵe malsupren, sin tiel grave vundante, ke li baldaŭ poste mortis; kaj nun Malgranda Muk sin trovis sola en la mondo, senhava kaj senscia. La senkompataj parencoj, al kiu la formortinto ŝuldis pli, ol kiom li povis repagi, forpelis la malfeliĉuleton el la domo kaj konsilis al li eliri en la mondon, por elserĉi sian felicon. Malgranda Muk respondis, ke li jam estas preta por la vojago; kaj ĉar nenion pli li petis por si, krom la vestaro de l' patro, oni plenumis lian deziron. Lia patro estis altkreska kaj vastkorpa viro; sekve la vestoj tute ne almezuriĝis al la filo. Sed Muk baldaŭ elpensis rimedon: li detranĉis de la vestoj tiom da ŝtofo, por malpli longigi lin laŭbezone, kaj poste li ilin surmetis. Sed pri la same necesa malplilarĝigo li tute forgesis; kaj el tio rezultas tiu stranga vestaro, kiun oni ankoraŭ hodiaŭ povas vidi sur li; la granda turbano, la larga zono, la ampleksa pantalono, la blua manteleto, ĉio ĉi tio estas heredajoj de lia patro, kiujn li depositis tiu tempo surportas ankoraŭ. Fine, alliginte al sia zono la longan Damaskan ponardon de l' patro kaj preninte bastoneton en la manon, li trapaſis tra la pordego de la urbo kaj ekforiris "en la mondon."

Goje li vojiris antaue la tutan tagon, ĉar ĉiuokaze li ja volis elserĉi sian felicon. Ĉiufoje kiam li ekvidis sur la tero vitropeceton, brilantan sub la sunaj radioj, li nepre eklevis ĝin kaj metis en sian poſon, kredante, ke ĝi ŝangigos en plej belan diamanton. Ekvidinte en la malproksimo la kupolojn de moskeo, brilegantajn kiel fajro, aŭ lagon lum-rejetantan kvazaŭ spegulo, li ek-rapidis tien kun koro plena de ŝojo, ĉar li kredis, ke li venas en ensorĉitan landon. Sed ho ve! Malaperis tiuj trompobildoj, kiam li iom pli proksimigis; kaj baldaŭ, tro baldaŭ rememorigis lin lia laceco kaj lia malsate doloranta stomako, ke li ankoraŭ sin trovas en lando de mortemuloj. Dum du tagoj li tiel vojagis, malsata kaj malgoja, kaj jam li ekmalesperis trovi sian felicon. Kampaj fruktoj estis, lia sola nutraĵo; la

malmola tero — ha nekta kušejo. Fine, la trian tagon matene, li ekvidis de sur monteto grandan urbon. Sur ĝiaj muroj kaj turoj brilege lumis la kvaronluno, dum gajaspektaj flagoj flortadis sur la tegmentoj kaj sajnaj fari signon al Malgranda Muk, ke li alproksimigis. Mirigita, li haltis kaj longe rigardis la urbon kaj ĝiajn ĉirkauaĵojn. "Jes," li diris al si mem, "tie Malgranda Muk trovos sian feliĉon, tie aŭ nenie"; kaj, malgraŭ sia laceco, li eksaltis de gojo. Li kolektis siajn fortiojn kaj ekiris pluen al la urbo. Sed kvankam ĝi sajnis tute proksima, li ne povis gin atingi antaŭ la tagmezo, ĉar liaj mallongaj kruretoj preskaŭ rifuzis lin porti, kaj ofte en la ombro de palmo li devis sidigi ripozis. Fine li alvenis antaŭ la pordego. Li ordigis sian manteleton, pli bele ĉirkauigis la turbanon, pli large algustigis la zonon kaj alkročis pli oblikve la longan ponardon; poste li forviſis de sur siaj ŝuoj la polvon, prenis sian bastoneton en la manon kaj eniris kurage tra la urba pordego.

Li jam trapasis kelke da stratoj, sed nenie malfermis por li eĉ unu dompordo, nenie oni vokis laŭ lia espero: "Venu, Malgranda Muk! mangu kaj trinku ĉe ni kaj ripozigu la etajn piedojn!"

Antaŭ granda bela domo li nun haltis kaj rigardis ĝin per sapiroplena okuloj, kiam malfermis unu el la fenestroj kaj maljuna virino sin klinis eksteren kaj vokis, kvazaŭ kantante:

"Envenu, envenu,
Ni gaje festenu;
Bongusta la kaĉo;
Vi mangos kun plaĉo;
Farita el gri', Kuirita por vi;
Najbaro, la kaĉo atendas ĉe mi!"

La pordo de l' domo malfermis, kaj Muk vidis eniri multegon da hundoj kaj katoj. Dum kelkaj momentoj li staris sendecida, ĉu li sekvu la inviton; sed fine li faris al si kuragon kaj eniris en la domon. Antaŭ lin du katidoj, kaj ĉi tiujn li decidis sekvi, ĉar kredeble ili pli bone scias, ol li, kie estas la kuirejo.

Kiam li atingis la supron de l' ŝuparo, renkontis lin tiu sama maljuna virino, kiun li jam vidis elrigardantan tra la fenestro. Si rigardis lin tre malafable kaj demandis, kion li volas. "Vi ja ĉiun invitis al via kaĉo," respondis Malgranda Muk, "kaj ĉar mi estas tiom malsata, mi do venis." La maljunulino ekridis kaj diris: "De kie vi venas, stranga hometo? La tuta urbo scias, ke mi kuiradas por neniuj krom miaj karaj katoj; kaj kelkfoje, kiel vi vidas, mi invitas najbarojn kunmangi kun ili." Malgranda Muk rakontis al ŝi, kiel mizera estis lia vivo depost la morto de lia patro, kaj petis ŝian permeson farigi hodiaŭ tablogasto de l' katoj. La virino, al kiu tre placis la nekaŝema rakonto de la simplanima Muk, konsentis, ke li sidigu ĉe ŝia table, kaj donis al li sate da mangajo kaj trinkajo. Kiam li estis satiginta kaj refortiginta, ŝi longe observis lin kaj poste diris: "Malgranda Muk, restu ĉe mi en mia servo; vi havos nur malmulte da laborego, kaj mi regalos vin bone." Malgranda Muk, al kiu la kata kaĉo estis treege bongusta, akceptis la proponon kaj tuj farigis serviston de Sinjorino Ahavzi. La devoj de lia ofico estis facilaj, sed neordinaraj. Sinjorino Ahavzi havis du katojn kaj kvar katinojn. Al tiuj ĉi bestoj Malgranda Muk devis ĉiumateni kombi la felon kaj froti per bonodoraj oleoj; ĉiufoje kiam la mastrino eliris en la urbon, li devis zorgi pri la katoj; kiam ili volis tagmangi, li devis meti antaŭ ili la pladojn; kaj ĉiuokte ili kuſigis ilin sur silkaj kusenoj kaj ĉirkauvolvis per veluraj kovriloj. Plie, estis en la domo kelke da malgrandaj hundoj, al kiuj li devis servadi; sed tiuj ĉi postulis malpli da priatendado, ol la katoj, kiujn Sinjorino Ahavzi traktadis kiel proprajn infanojn. Cetere, Malgranda Muk vivis tute same solece, kiel en la domo de sia patro, ĉar, krom la mastrino, li vidis dum la tuta tago nur hundojn kaj katojn. Dum kelka tempo estis al li

tre bone en la nova hejmo; ĉiam li havis plene da mangajo kaj malmulte da laborego, kaj la maljunulino sajnis tute kontenta pri li. Sed iom post iom la katoj farigis malbonkonducon: kiam la maljunulino forestis el la domo, ili ĉirkausaltadis en la ĉambro kiel frenezaj, disjetadis ĉion, kio baris al ili la vojon, kaj disrompis pli ol unu belan vazon. Sed tuj, kiam ili ekaŭdis sian mastrinon suprenenantan sur la ŝuparo, ili forrampadis sur siajn kusenojn kaj svingadis la voston, kvazaŭ nenio okazis. Sinjorino Ahavzi kolerigadis, kiam ŝi vidis sian ĉambrón tiel ruinigita, kaj kulpigadis Muk-on pri ĉio; li tiam vane asertis sian senkulpecon: al siaj katoj, kiuj ja havis mienon tiel senpekan, ŝi kredis pli, ol al sia servisto.

Tre malgoja pro tio, ke ankaŭ ĉi tie li ne trovis sian feliĉon, Malgranda Muk decidis eksigi el la servo de Sinjorino Ahavzi. Sed ĉar la sperto instruis al li, jam dum lia unua vojaĝo, kiel malfacile estas vivi sen mono, li nun ekpensis, per kia rimedo li povas havigi al si la salajron, kiun ĉiam lia mastrino al li promesis, sed neniam donis. En la domo de Sinjorino Ahavzi estis ĉambro, kiu ĉiam restis ŝlosita, kaj kies internon li neniam vidis, kvankam li jam ofte aŭdis la virinon ĉirkaubruadi malantaŭ la pordo. Multe li donus por tio, se li povus ekscii, kion ŝi tenas tie kaŝita; kaj nun, dum li pensis pri sia vojaĝa mono, venis al li en la kapon, ke eble tie trovigas kaŝitaj la trezoroj de l' virino. Sed ĉiam la pordo restis ŝlosita, kaj estis al li neeble atingi la trezorojn.

Foje, matene, kiam Sinjorino Ahavzi estis elirinta, unu el la hundetoj, kiun ŝi ĉiam duonpatrine traktadis, sed kies favoron Malgranda Muk plejaltagrade akiris al si per ĉiuspecaj amseroj, kaptis lin je lia vasta pañtalono kaj forte tiradis, kvazaŭ por diri, ke Muk ĝin sekvu. Muk, kiu amis ludi kun la hundeto, sekvis ĝin; kaj jen kondukis lin la hundeto en la dormoĉambreton de Sinjorino Ahavzi kaj antaŭ malgrandan pordon, kiun li tie neniam vidis antaŭe. La pordo estis duone malfermita. La hundeto eniris, kaj Muk ĝia sekvis. Miris kaj ŝojis la malgrandulo, sin trovantente nun en la ĉambro, kiu jam de longe estis la celo de liaj deziroj. Li esploris ĝin de ĉiuj flankoj, esperante trovi monon, sed trovis nenion krom malnovaj vestaĵoj kaj vazoj strange formitaj. Unu el ĉi tiuj vazoj kaptis lian apartan atenton. Ĝi estis el kristalo, kun belaj entrancitaj figurajoj. Li eklevis ĝin kaj turnadis en ĉiuj direktoj. Sed, ho teruro! Li ne rimarkis, ke ĝi havas kovrilon nur malfirme surmetitan. La kovrilo defalis sur la plankon kaj disrompiĝis je milo da pecetoj.

Dum longa tempo Malgranda Muk staris tie, kvazaŭ senviva de teruro. Nun lia sorto estis decidita; nun li nepre devis forkuri, alie la maljunulino lin certe batus ĝismorte. Li do decidis komenci senprokraste la vojaĝon, sed antaŭe li ĉirkauigardis ankoraŭ unu fojon, ĉu ne utilus al li dum lia marsado tiu aŭ alia havajo de Sinjorino Ahavzi. Subite renkontis liajn okulojn paro da grandegaj pantofloj; verdire, ili tute ne estis belaj; sed liaj propraj ŝuoj jam ne povis plu vojaĝi; kaj, krom tio, allogis lin tiuj pantoflegoj ĝuste per sia grandeco, ĉar se li ilin surhavus, espereble vidus el tio ĉiuj lin rigardantaj, ke li jam ne portas plu siajn ŝuojn de infano! Siajn proprajn pantofletojn li do rapide demetas kaj surmetis la grandajn. Poste, ekvidinte en angulo promenadan bastoneton kun bele skulptita leonokapo, kaj opinante, ke ĝi tie ne havas sufice por fari, li ankaŭ ĉi tion propriigis al si, kaj forrapidis el la ĉambro. Li tuj kuris en sian propran ĉambreton, surmetis sian manteleton kaj la patro-devenan turbanon, alkročis al sia zono la ponardon kaj, kiel eble plej rapide, elkuris el la domo kaj for el la urbo. Lia timo antaŭ la maljunulino igis lin kuri kaj kuri, ĝis liaj fortioj preskaŭ finigis. Antaŭe neniam li kuris tiel rapide; eĉ ŝajnis al li, kvazaŭ li ne povas ĉesi

kuri, kvazaŭ nevidebla potenco peladas lin pluen. Fine venis al li la penso, ke sendube la pantofloj havas ian specialecon, ĉar ili jetegis sin senhalte antati, lin kunfotrenante. Per ĉiuj eblaj rimedoj li penis haltigi ilin; sed nenio helpis, ĝis fine, en terura korpremigo, li kriis al si mem, kvazaŭ al ĉevalo: "Pru! halt! pru-u-u!" Nun haltis tuj la pantofloj, kaj Muk sin jetis, ellaciginta, sur la teron.

La pantofloj ĝojigis lin treege; ĉar nun ja fine li akiris al si, per siaj servoj, ion, kio povas utili al li en la mondo, por trovi lian felicon. Sed, malgraŭ sia ĝojo, li endormigis pro laceco; ĉar la korpeto de Malgranda Muk, pro la peza kapo, kiun ĉiam ĝi devis kunkonporti, ne povis multe elteni. Dum li dormis, aperis al li en songo la sama hundeto, kiu, en la domo de Sinjorino Ahavzi, helpis lin akiri la pantoflojn, kaj parolis: "Kara Muk, vi ankoraŭ ne bone komprenas la uzadon de viaj pantofloj. Sciu, ke se vi vin turnos en ili tri fojojn sur la kalkanumo, vi povos flugi, kien ajn vi nur volos. Kaj per la bastoneto vi povas trovi trézorojn, ĉar ĉie, kie ora estas enterigita, ĝi frapos trifioje la teron; por argento, dufoje." Tiel songis Malgranda Muk. Reviginte, li pripensis la mirigan songon kaj decidis ekprovi la aferon. Li surmetis la pantoflojn, levis unu piedon kaj komencis sin turni sur la kalkanumo. Sed kiu iam provis plenumi ĉi tiun lertajon trifioje intersekve en gigante vasta pantoflo, tiu ne mirois pro tio, ke Malgranda Muk ne tuj sukcesis, precipe konsiderante, ke lia peza kapo transklinis lin jen sur unu flankon, jen sur la alian.

Kelke da fojoj la kompatindulo falis forte sur la nazono; tamen li ne lasis sin senkuragi, sed ripetis la provon, ĝis li fine sukcessis. Kiel tupo li turnigis sur sia kalkanumo, ekdeziris sin en la plej proksiman urbon, kaj — ekveturis la pantofloj supren en la aeron, kuregis ventorapide tra la nubo, kaj antaŭ ol Malgranda Muk povis konsci, kio farigas kun li, li jam sin trovis sur granda foirejo, kie staris multe da budoj kaj sennombraj multokupataj homoj iradis tien kaj reen. Komence li iom promenis tra tiu ĉi popolamaso; sed baldaŭ li trovis ĝin pli konsilinda, sin direkti en straton malplii movopienan, ĉar sur la foirejo oni piedpremis liajn pantoflojn, ke li ofte falsoanceligis, kaj nur kun granda peno prosperis al li eviti la batojn de tiu aŭ alia, kun kiu kunpuŝigis lia elstareganta ponardo.

Nun Malgranda Muk serioze pripensis kion fari, por enspezi iom da mono. Li ja havis bastoneton, kiu malkovrus al li sekretajn trézorojn; sed kie li trovos la lokon, kie kuſas subtere oro kaj argento? En okazo de bezono li povus sin montri eksposicie, por sin riĉigi je kelke da groſoj; sed por tio li ja estis tro fiera. Fine li rememorigis al si la rapidecon de siaj piedoj. Eble, li diris al si en la pensoj, miaj pantofloj povos subteni mian vivon; kaj li decidis dungigi sin kiel kurieron. Esperante, ke plej bone pagus tiajn servojn la rego de la urbo, li demandis pri la vojo al la palaco. Antaŭ la pordo de l' palaco estis gardostaranto, kiu demandis lin, kion li sercas ĉi tie. Je lia respondo, ke li sercas oficon, oni kondukis lin al la estro de la sklavoj. Al tiu ĉi lasta li sciigis sian deziron kaj petis lin, ke li havigu al li oficon inter la regaj kuriero. La sklavestro mezuris lin per sia rigardo de la kapo ĝis la piedoj kaj parolis: "Kiel? Kun tiaj piedetoj, kiu havas apenaŭ la longon eĉ de unu manstreco, vi volas esti rega kuriero? For de ĉi tie! Kun tiaj malsaguloj mine havas tempon por ŝerci." Malgranda Muk certigis lin, ke li parolis tute serioze, kaj ke li estas preta fari konkukradon kontraŭ la plej rapidpieda kuriero. La sklavestro trovis la aferon treege ridinda; tamen li ordonis, ke li tenu sin prete vekuri jam antaŭ la vespero, kondukis lin en la kuirejon kaj zorgis, ke oni donu al li sufice da mangajoj kaj trinkajoj. Li mem iris al la rego kaj rakontis al li pri la malgranda homo kaj lia propono. La rego estis gajhumora sinjoro kaj ĝojs multe, ke la

sklavestro retenis Malgrandan Muk' on por celo de amuzo. Li ordonis al li, ke li faru sur granda herbejo malantaŭ la palaco la necesajn arangojn, por ke la tute kortego povu bone kaj komforte rigardi la kuradon; kaj denove li admonis, ke oni bone regalu la hometon. La rego rakontis al siaj princoj kaj princinoj, kian spektaklon ili havos hodiaŭ vespero. Tiuj ĉi rerakontis ĝin al siaj servistoj; kaj kiam alproksimiĝis la vespero, regis ĉe la kortego kaj en la urbo plej ĝoja ekskito kaj ĉiuj, kvazaŭ torrento, direktigis amase al la herbejo, kie oni jam starigis tribunojn, por vidi kuradi la fanfaroneman hometon.

(Daŭrigota.)

Al ĉiu Brita Medicinisto.

ESTIMATA SINJORO,—La Rega Kolegio de Medicinistoj kaj la Rega Kolegio de Hirurgoj en Irlando aprobis la enkondukon de Esperanto en la liston da latuvolaj temoj por la enira ekzameno medicina. Tamen estas necese ricevi la aprobon de la Generala Medicina Konsilantaro. Tiu ĉi anaro konsistas el 34 anoj (1) reprezentantoj de universitatoj, (2) de kolegioj, (3) nomitaj de la "Krono," kaj (4) elektitaj senpero de la profesio. La universitatoj aŭ kolegioj estas en London, Cambridge, Oxford, Birmingham, Manchester, Liverpool, Leeds, Sheffield, Durham, Edinburgh, Glasgow, Aberdeen, St. Andrews kaj Dublin. Oni trovos la nomojn en la antaŭparto de la "Medicina Direktorio" aŭ la subskribinto sendos ilin laŭ peto. La proksima kunveno okazos en Novembro.

Mi petegas, ke la samideanoj trarigardu la nomojn kaj interesigu la anojn, kiu logas en ilia urbo. Estas plej grave, ke ili faru tion ĉi kiel eble plej baldaŭ, ĉar Esperantaj aferoj movas malrapide.—Samcele via,

G. JAMESON JOHNSTON.

13, Lower Fitzwilliam-street, Dublin.

Al la Redaktoro de THE BRITISH ESPERANTIST.

Antaŭ kelkaj tagoj mi renkontis en Londono konatan dentiston el New York, jus revenintan el la tutmonda dentista kongreso en Berlin. Mi demandis, kiel al li placiis tiu kunveno.

"Nu," li diris, "mi tre malkontentigis pri la procedo, kaj mi ne restis ĝis la fino. Mi kompreneble vojagis el New York al Berlin por eksci kiajn progresojn faris la Eŭropaj dentistoj kaj kion ili havas por instrui al ni Amerikanoj. Sed mi eksciis tre malmulte. Ekzistis diversaj sekcioj — ekzemple, angla sekcio, franca sekcio, germana sekcio, k.t.p., kaj en ĉiu estis uzata la nacia lingvo de la sekcionoj. Mi iom scias la germanan kaj francan lingvojn, sed ne sufice, por ke mi povu inteligente sekvi la diskutadojn. Kompreneble mi ne sciigis pri multe da tio, pro kio mi venis."

"Estis ankaŭ Esperanta sekcio," li aldonis, "kaj mi certe intencas lerni tiun lingvon. Ĉu ĝi estas facile lernebla? Mi bone komprenas, ke kongresoj internaciaj Esperante kondukataj havus grandan valoron por la partoprenantaj, sed la internaciaj kongresoj kondukataj diverslingve kaj sekcie tute maltrafas la speciajn celon de tiaj kunvenoj."

Tia estas la atesto de tre inteligenta ne-Esperantisto pri la valoro de Esperanto. Kompreneble mi donis al li Cefecan Slosilon, malgrandan lernolibron, k.t.p., esperante, ke dum la marvojaĝo al New York li ellernos la lingvon kaj farigos, kiel li promesis, fervora Esperantisto.

CLARENCE L. DEAN.

London, la 14an de Septembro, 1909.

Libraro kaj Gazetaro.

La Revuo (Septembro).—En la datūrigo de "Marta," tradukita de nia Majstro, la jenaj esprimoj estas notindaj: ĉi tiu ĉambreto *aspektis* nun ankoraŭ pli malgaje ol tiam, kiam la juna virino la unuan fojon transpaſis ĝian sojlon (this tiny room looked now still more depressing than when for the first time the young woman crossed its threshold).—Neatenditaj, brilantaj *perspektivoj* kreigis antaŭ ŝiaj okuloj (Unlooked for, brilliant prospects opened before her eyes).—Mi farigis *inda vin!* mi evitis morton *permalsatan* kaj vivon *peralmozan!* (I have become *worthy of you!* I have avoided death *through hunger and a life of charity* [living by beggary]).—La *intuicio*, tiu alta kaj malofta naturdono (*Intuition, that high and rare gift of nature*).—Gretchen, deſirante laŭvice la negoblankajn folietojn de kampa *astro* (Gretchen, plucking, one after the other, the petals of a wild *aster* [? daisy]).—En la librejo estis nejuna homo kun okulvitroj, kun *kalva kapo* (In the bookshop was an elderly man with glasses, with *bald* [calvous, Lat. *calvus*, Fr. *chauve*, Germ. *kahl*, Span. *calvo*] head).—Marta rimarkis lian *genatecon* (Martha noticed his uneasiness).—Via stilo... estas *kerneca*, vigla, en multaj lokoj plena de vervo kaj fajro (Your style is *pithy*, lively, in many places full of verve and fire).—Vi donis al ŝi bonan *forregalon!* (You gave her a good *stirrup-cup!* [dismissal, send-off]).—Li sidis... *super kelkaj dekoj* da volumoj; ŝi pasigis kelkajn *dekojn* da noktoj *super* laboro, kiu kondukis al nenia celo.—Si *fale sidigis* sur ĝi.—Sur la trotuaro marſis paro da *homoj*: *virino kaj viro*.—La vundo de la koro iel *cikatrigis* (the heart wound somehow *healed up* [closed, cicatrized]).—La virino en la atlasajoj kaj zibelajoj (The woman in the satins and sables). En la plua enhavo troviĝas tri bonaj fotografajoj de la reĝo kaj regino de Hispanujo kaj de S-ro F. Pujulà y Vallés, prezidanto de la Kongreso; "La Rubeno," unuakta komedio de H. Lavedan, tradukita de la Baronino F. de Ménil; "La Koridora Dormočambro" de Mary E. W. Fredman, esperantigita de C. E. Randall; "Matenaj Koloroj," versajo de René Deshays.—G. C.

Universo.—Tiu ĉi estas la unua kajero de nova "Internacia Revuo por la Belo," redaktita de D-ro A. Schramm kaj Prof. D-ro S. Lederer. Oni ne publikigas en la Revuo ĝian prezon, nek ĉu ĝi estas ĉiumonata gazeto, aŭ ne. Eldonejo: Heckners Verlag, Wolfenbüttel, Germanujo. La gazeto enhavas 32 pagojn, kaj 18 bonegajn fotogravurajojn. En la enhavo troviĝas, "Cu vi Memoras?" versajo de Hugo Marx; "Van Huysum kaj liaj Florpentraĵoj," originala bela rakonto bonstile esperantigita de Prof. D-ro S. Lederer; "Katikazaj Skizetoj," de D-ro Fiſer el Tiflis, tre interesa priskribo de la multpopola, multlingva, preskaŭ fabeleca lando ĉe la ekstremai sud-orientaj limoj de Eŭropo; "Worms sur la Rejno," de Karlo Brigleb; Fotografajo de la anoj de la Grupo en Jeruzalemo, k.t.p. Ni deziras plenan sukceson al la redaktoroj, kaj varme rekomendas tiun ĉi bonege presitan kaj elegante desegniton Revuon por la Belo al niaj legantoj.—G. C.

In Duonmonato (Oktobro).—La unua numero de ankoraŭ unu nova gazeto, kiu ankoraŭ venis al ni el Germanujo; du novaj gazetoj en unu monato el Leipzig kaj Wolfenbüttel montras, ke niaj germanaj samideanoj estas plenplenaj de entreprenemo, kaj ni deziras al ili koran sukceson. La gazeto enhavas 16 pagojn, kaj estas bone presita sur bona papero; jara abono Sm. 1.75 por la 24 numeroj. Ĝi estas priskribita kiel "Tutmonda Esperanta Revuo, alterne ilustrata, por la vivo de la Esperantistaro sur ĉiuj kampoj de la homa spirito." La redaktoro (S-ro Karl Steier, 6, Thomasring, Leipzig, Germanujo) diras, ke ĝi estas kaj estas redaktata en la pura, nesangita Zamenhofa Esperanto. En la enhavo

troviĝas traduko de Leo Belmont el "Libro de Kantoj" de Heine; "Konsilo por Junaj Poetoj" de Goethe, tradukita de Leopold Elb; "Likvigitia Aero," originale verkita de Prof. Marcel Finot; "Kvindekjara Datreveno de Naskiĝo de D-ro Zamenhof," propono de Karl Steier al la Konstanta Komitato de la Kongresoj; "Helpa kaj ne Konkura Lingvo," originale verkita de D-ro K. Rohrbach; "Esperanto en Komerco kaj Industrio," de J. Heyn, k.t.p.—G. C.

Allaj Verkoj Ricevitaj.—*Esperanto en unua duodekjaro 1887-1908*, kolekto da utilaj kaj frapantaj statistikaĵoj kompilita de Adam Zakrewski, reprezitajo el *Pola Esperantisto*.—*Belegaj Vidajoj ĉirkau Pendle Monteto*, verkita en la angla lingvo kaj Esperanto de Jas. H. Greaves, sekretario de la Rishton Esperanta Societo. Ĝi enhavas 40 vidajojn de la bela pejzaĝo apud la riveroj Ribble, Hodder kaj Calder, la oficialan kanton de la Federacio de Lancashire kaj Cheshire, adresojn de la societoj kaj sekretarioj, k.t.p. Prezo: 7½p. kaj 1s. 1½p. afrankite ĉe la firma Counsell kaj Greaves, Rishton.—*Foto*, 48-paĝa katalogo de la grava, ciekonata firma Hüttig A. G., Dresden-Striesen, Schandauerstr. 76. Ĉi tiu bele kaj multilustrita katalogo de fotografiloj kaj optikaj aparatoj estas ankoraŭ nova signo pri la ĉiama pliuziĝo de nia lingvo en la komerca mondo. Ĉio en ĝi estas tre detale priskribita en bonstila Esperanto, kun la prezoj en spesmiloj. En la antaŭparolo ni legas: "Por plifaciliĝi kunekesterlandajn interrilatojn lasttempe ni volonte akceptis la helpeman servadon de la internacia helplingvo Esperanto prezentatan por forigi la barojn ankoraŭ de ni ofte sentitajn, kiuj malfaciligas aŭ eĉ iafoje malebligas la internacian interkomunikigon: la barojn de la diverslingveco. Trapasinte esperantokurson de ni speciale arangitan, parto de nia oficistaro scipovas Esperanton buše kaj skribi, kaj tiel nuntempe estas eble al ni plenumi ĉian Esperantan interkorespondadon. Tial ni prezentas per ĉi tio unafoje al la gesamideanaro resumon esperantigitan el nia ĉefprezaro, rekondante ĝin al afabla priatento."

—*Hungaraj Banlokoj Herkules, Föstyén kaj Korond*, ilustrita aldono al *Hungara Esperantisto*, ĉe Redakcio: Budapest, VII., Alpar-u. 8.—*Preisgekrüter Lehrgang der Welthilfssprache Esperanto*, mit vollständig neuer, systematischer Wortbildungsslehre von G. Christoffel (Nova Esperanta lernolibro por germanoj), ĉe Verlag von Gustav Wenzel und Sohn, Braunschweig, Germanujo.

Busĉevalo.

1.

Sur herbejo saltis foje ĉevalido —
Vostharoj ĝiaj en la vent' flirtadis;
Nazspirege — sklav' ankoraŭ ne al brido —
L' aeron de l' montar' ĝi flarguadis.

2.

Frumatenon iua — ve! alvoke venas
Homaĉo kun en mano laĉsnurego;
En l' alia li — avenlogajon tenas —
Gojb'eke l' ido pensas pri manĝego.

3.

Kie nun l' herbejo? — montaero kie?
La ido? — nun en ago deksepjara —
Omnibusĉevalo estas profesie —
Kun kruroj kurbigintaj — vost' senhara!

4.

Kial tiu grupo? — kio okazinta?
L' amaso demandege ĉirkatupremas:
"Fi-ĉevalo nure — estas morifaŭta"
— Nur l' strata ĉirkaŭbru' ĝin requiem-as.

G. P. LELY,

Brita Kroniko.**LONDONO.**

La generala ĉiujara kunveno de la Federacio de Londonaj Esperantistaj Societoj okazos merkredon, la 27an de Oktobro, je la 7a 15 v., en St. Bride's Institute. Ĉiuj membroj de l' federitaj Londonaj Societoj estas kore invitataj ĉeesti. Je la 8.15 sekyos koncerto, je enira prezo 3p. Venu amase!

Camberwell.—En la "Conversazione" de la *Wren-road Philosophical Society*, okazonta la 13an de Oktobro, tablo estos rezervita por Esperanta literaturo, k.t.p. Lekcio pri Esperanto estos farata al la membroj de tiu sama societo, je la 8an v., la 3an de Novembro.—La 13an de Oktobro, okazos propaganda parolado pri Esperanto en *St. Jude's Parochial Hall, Railton-road, Herne-hill*, je la 8a v.

Emmanuel.—La 28an de Aŭgusto, la klubo faris ekskurson ĝis *Avery-hill, Eltham*, kaj invitis samideanojn kaj amikojn. Je la 3a p.t.m., ĉe Camberwell-green 28 personoj entramigis kaj veturnis ĝis Lee Green. De tie ili promenis ĝis Avery-hill (2½ mejloj) kaj ĉirkaŭiris la palacon de Kolonelo North, la flor- kaj fruktoĝardenojn. Fine alvenis S-ro C. White, kelkaj membroj de "Suda Stelo" kaj aliaj samideanoj. Kvardek personoj kune trinkis teon kaj poste, S-ro Mann, laŭ peto de la prezidanto de Emmanuel, faris paroladon pri Esperanto kaj S-ro Parker parolis pri la Majstro. Antaŭ ol forlasi la ĉambron oni kantis "La Espero." Tuj poste ĉiuj grupigis ekstere por fotografigo. Inter la ĉeestantoj oni rimarkis per la steloj kvin membrojn de U.E.A., ankaŭ reprezentantojn de R.E.A., Londona, Clarion, Battersea, "Suda Stelo" kaj Edinburga Grupoj. La ekskursanoj alvenis en Lee Green je 8.45a post plezuriga promenado tra la kampoj. Dum la tramveturado oni multe kantis kaj disdonis libretojn al la ŝajne tre interesataj kunvojagantoj.—La 25an de Oktobro, la membroj de ĉi tiu societo faros feston en *All Saints' Parish Room, Croxton-road, W. Dulwich*, je la 8a v. La programo enhavos i.a. prezenton de l' propaganda teatraĵeto "A Norman Conquest," paroladojn, kantojn, k.t.p.—E. A. A.

Kingston-on-Thames.—Oni bonvole atentigu kaj dissiciigu, ke Esperanta kurso estas farata ĉiusemajne de la agema sekretario de la loka grupo, S-ro F. M. Sexton, F.B.E.A., en la Tehnika Instituto. Oni esperas multinombran lernantaron. Sin turni al la Instituto.

Sutton.—La unua ĉiujara kunveno de ĉi tiu grupo okazis jaŭdon, la 24an de Junio. Legiĝis raportoj pri la agado dum la pasinta jaro. La progresoj faritaj estis sufice kontentigaj, kvankam pro diversaj kaŭzoj kelkajn kunvenojn ĉeestis nur malgranda nombro da ajoj. Oni intencas fari vigilan propagandon ĉi tiun vintron, speciale inter lokaj societoj.—La diversaj oficistoj reelektiĝis. Oni decidis (1) ke la grupkotizo estos 5s. ĉiujare, aŭ 3s. duonjare; (2) starigi pruntedonan Esperantan grupbibliotekon.—La grupo komencis sian vintran sezondon la 2an de Septembro. La kunvenoj okazas ĉiujaude de la 7a ĝis la 9a, en la halo apud la Wesleyan pregejo en *Carshalton-road*. Vizitontoj bonvole skribu antaŭe al la sekretario.—Merkredon, la 20an de Oktobro, okazos publika parolado pri Esperanto, en la Wesleyan School-room, Carshalton-road. Ĉiuj lokaj Esperantistoj estas kore invitataj ĉeesti: helpemuloj volu antauscribi al sekretario; estos tempo por demandoj.

Wimbledon.—Dank' al la komplezo de F-ino Dyer, la antaŭellonge fondita grupo ĉi tie nun povas kunveni en la *Chatham House Lernejo, Queen's-road*. Oni kore invitas al partoprenado en la grupvivado ĉiujn Esperantistojn, kiuj logas en la kvartalo.

LA PROVINCOJ.

Birmingham.—La samideanoj ĉi tie bone laboris dum la pasinta jaro. Dum la vintro kursoj okazis ĉe la publika lernejo sur *Bristol-street*, en la institutoj en Sparkhill kaj Harborne, kaj en lernejo en Erdington. En la printempo okazis ekzameno de la *Midland Counties Union of Educational Institutions*, laŭ tri gradoj. Oni faris parolojn en la *Y.M.C.A.* ejo, antaŭ la *Incorporated Society of Musicians*, k.t.p. La Harborne Esperanto Society fondigis je la tago dediĉita al S. Georgo kaj prezentis bonan koncerton, kiu ĉeestis multaj personoj.—Dum la somero la grupoj en Birmingham kaj Coventry arangis kelkajn kunvenojn en diversaj urboj en Warwickshire, kiuj kredeble portos frukton dum la venonta vintro en novaj kursoj kaj grupoj.—Oni ankaŭ sendis cirkularan leteron al ĉiuj sekretarioj de Societoj por Kristana Celado kaj sekretarioj de *Wesley Guilds*, krom kelkaj aliaj societoj: sekve de tio la prezidanto faros lekcion en Novembro antaŭ la *Shorthand Writers Association*.—S-ro Y. Alvarez, hispano, nun loganta en Birmingham, parolos antaŭ la franca sekcio de la *Cosmopolitan Club* en Novembro.—Ni havis la plezuron akcepti kelkajn vizitantojn: F-ino de Sélincourt el Hinduo, F-ino Taylor el Bradford, S-ro Mann el Londono, kaj S-ro Goodliffe kaj Johnson el Nottingham. Ni deziras certigi samideanojn, ke vizitantoj estas ĉiam tre bonvenaj; ili bonvolu ĉiam sciigi aŭ viziti nin, kiam ili estas en la ĉirkaŭaĵo. S-roj Goodliffe kaj Johnson faris tre bonan propagandon en libertempa lernejo en Sutton Coldfield, kie ili pasigis kelkajn tagojn; ili parolis pri Esperanto al la aliaj libertempuloj (kelkaj el kiuj estas instruistoj) kaj tiojn interesis ilin ke kurseto okazis. Imitinda ekzemplo!—F. W. H.

Bristol.—Ni atentigas pri la sekvanta paragrafo, kiu aperas angle sur paĝo 8a de la "Bristol Evening Schools Directory": "Klasoj estos ankaŭ formataj por instruado pri Ambulanca Laboro, Civitaneco, Korpa-Ekzercado, Voĉa Muziko, Esperanto, aŭ por ĉiu alia aprobata temo pri kiu sin enskribigas 20 studentoj. Neniu tia klaso estos daŭrigata, se la nombro de la studentoj ne plimultigas ĝis 25 antaŭ ol pasos tri semajnoj de la malfermigo." La sekretario (S-ro R. W. Gilliard, 27, West Shrubbery, Redland, Bristol) do insistas, ke ĉiu deziranta partopreni kurson tuj sendu al li sian nomon kaj adreson por sendo al la Bristol'a Edukada Oficejo.

Coventry.—La somera programo de la ĉi-tiea grupo finigis sabaton, la 11an de Septembro, per kolektigo de la somere varbitaj gesamideanoj en *Mayor's Parlour Café*, la nova sidioko de la grupo; pli ol dudek ĉeestis el diversaj najbaraj urboj vizititaj de la Coventry'anoj dum la pasintaj tri monatoj. Post te-trinkado, atskultis kun granda intereso la paroladetojn de F-ino W. E. Taylor kaj S-roj A. J. Morgan kaj I. H. Wright.

Derby.—En Aŭgusto, nova grupo, kiu nun havas 30 ajojn, starigis en ĉi tiu urbo, sub la nomo: "Derby Clarion Esperanto Group." Hon. sekretario estas S-ro A. Watton, 63, *Grosvenor-street*.

Dewsbury.—Ĉi tiu grupo nun kunvenas en ĉambro metita je sia dispono de la komitato de la Tehnika Lernejo, kie nun komenciĝis nova kurso Esperanta. Oni disdonas propagandilojn en la Publika Biblioteko, ankaŭ en la biblioteko de la Kooperativa Societo. Du propagandaj paroladoj estas arangitaj en filioj de tiu lasta por la venonta vintro.

Harrogate.—La sekretario petas nin anonci, ke li ĉiam gojas ricevi antauſcūgon de iu Esperantisto vizitonta el Harrogate, ĉar la grupo kutimas fari specialajn arangojn por renkonti amikojn kaj montri al ili la belaĵojn de la urbo. Jam ĉi tiun jaron oni tiej pasigis multajn tre agrablajn horojn.—Bona sciigo: la

ĉi-tiea Edukada Komitato starigis oficialajn vesper-kursojn pri Esperanto en la Tehnika Lernejo, kio sendube havigos al la grupo pluajn membrojn.

Hebden Bridge.—En la ĵus-eldonita libreto de la Komitato de Tehnika Edukado aperas lecionaro por dua-grada kurso en Esperanto. La lecionaro enhavas la tutan gramatikon, la studadon detale de "Ifigenio en Taŭrido," poemojn, kantojn, eltiraĵojn por la deklamo, interparoladojn, paroladojn senprepare, kaj diskutadojn. La sekretario de la Esperantista Grupo estos la instruisto, kaj oni esperas, ke sufiĉe da komencantoj interesigos pri Esperanto, por ke la komitato provizu kurson ankaŭ por ili. La kurso tuj komencigos.

Huddersfield.—La dua ĉiujara kunveno de tiu ĉi grupo okazis jaŭdon, la 2an de Septembro, en la "Parochial Hall" kaj ĉirkaŭ 50 personoj ĉeesis. S-ro W. H. Hirst, F.B.E.A., prezidis. Post la kantado de "La Espero" la sekretario legis tre kontentigan raporton pri la klopodoj de la grupo dum la pasinta jaro. La grupanoj kunvenadis ĉiusemajne ĉe la Tehnika Kolegio dum la vintro kaj en *Greenhead Park* dum la somero, kaj pro tio ricevis ekzercardon kaj multe plilertigis. Dank al la individuaj klopodoj de la grupanoj kaj la propagandaj artikoloj en la ĵurnalo *Huddersfield Examiner*, multaj personoj nun interesigas pri la lingvo kaj oni esperas, ke kvar kursoj, krom la kurso en la Tehnika Kolegio, sub la Edukada Komitato, okazos dum la venonta sezono. La raportoj de la konsulo, S-ro F. Clarkson, kaj la kasisto, S-ro J. H. Fitton, ankaŭ estis kontentigaj. La rezultato de la elektado estis jena:—Oni elektis kiel prezidantinon, Fratlinon H. Cotton; kiel vic-prezidantojn, S-rojn Fitton, Clarkson kaj Hirst; kiel sekretarion, William H. Hirst, *Esperanto House, Thornton Lodge-road*. Jus antaŭ la elektado, unu el la grupanoj, S-ro W. P. Roberts, eniris la Ĉambron, reveninte de Brünn, Aŭstrio, post trimonata restado. La grupanoj tre kore bonvenigis lin kaj petis, ke li faru paroladeton. Li diris, ke la Brünnaj samideanoj akceptis lin tre afable, kaj li trovis ilin tre gentilaj kaj bonkoraj, kaj ili reciproke farigis amikojn tuj pro la interkomunikilo Esperanto. Li jam provis la lingvon kaj trovis ĝin tre utila.— Ĉiuj Jorkširaj samideanoj bonvole notu, ke la dato de la federacia kunveno kaj la Huddersfield'a festo estas la 23a de Oktobro (la *kvarta* sabato en Oktobro). Venu grandamase, ĉar ni jam luis unu el la plej grandaj, komfortaj kaj centraj ĉambregoj en Huddersfield (*Temperance Hall, Princess-street*).

Kettering.—Bonegan ekzemplon montris S-ro Jackson Coleman, la sindonema sekretario de la Esperantista Grupo en Reading, utiligante sian libertempojn por viziti Kettering kaj diskonigi tie nian lingvon. Tre kontentigaj rezultoj sekvis lian laboron, kiun li daŭrigis dum preskaŭ du semajnoj, parolante en kunvenoj kaj fordonante propagandilojn al ĉiu renkontito. Dimanĉon, Augusto 29an, li paroladis en la *Gold-street Adult School*, ankaŭ al la gelernantoj en *Fuller Sunday-school*. La sekvantan dimanĉon li ĉeestis la *Stamford-road Adult School*, kaj posttagmeze la *Fuller Young Men's Bible Class*. Sed la ĉefa okazo estis la kunvenego en la *Co-operative Hall*, merkredon vespere, Sept. 1, kiam ĉeestis granda aŭdantaro, inter kiuj estis lernejstroj, advokato kaj aliaj eminentuloj, por audi lian paroladon pri "Esperanto, the modern miracle, its aims and claims, birth and worth." Bonega sukcesa logajo estis la kantado de ses kantoj, speciale presitaj skribmaſine por tiu misio, kiujn la aŭdantaro kantis sen malfacileco. Fratlinio Mitchell, junia knabino el la *Fuller Sunday-school*, kantis sole unu verson el ĉiu kanto, pri kiu miris ĉiuj, ĉar ŝi nur sciigis pri la lingvo antaŭ kvar tagoj. Post la kunvenoj ĉirkaŭ sesdek donis siajn nomojn por Esperanta kurso, kaj kio estas pli grava rezultato, la Edukada Komitato eble permesos ke oni

alkonduku la temon en la publikajn teknikajn kursojn. Entute la efektoj de la "Esperanta Misio" de nia fervorega samideano estis bonegaj, kaj ni kore rekondas lian ekzemplon al aliaj.

Leeds.—Esperanto bone progresas ĉi tie ĉe la diversaj "P.S.A." Rondoj. La 8an de Septembro, S-ro J. Hedley Ince komencis kurson ĉe la Rondo de la *Oak-road Congregational Church* kaj preskaŭ 30 membroj nun regule lernadas la lingvon.

Liverpool.—La vojaĝantaj samideanoj volu noti, ke en la *L. and N.W.R.* Hotelo troviĝas rumaña Esperantista kelnero nomata S-ro G. Georges. Estas bona okazo por vizitantoj mendi iliajn bezonaĵojn, Esperante kaj tiel propagandi la lingvon. Neesperantistoj povas uzi unu el ok aliaj lingvoj kaj esti komprenata sed el la naŭ lingvoj, kiujn S-ro Georges scias, li tre preferas Esperanton.—R. W. G.

Newcastle.—Esperantaj kursoj estas farataj ĉiumarde en la Church Institute, Hook-street: elementa, instruata de S-ino Wright de la 7a ĝis la 8a; duagrada (8a-9a, F-ino Barber); kaj konversacia (9a-10a, direktata de diversaj grupanoj).—La 16an de Oktobro, okazos la Nord-Orienta Federacia Kunveno, en la Connaught Hall, Newcastle, je 3.30 ptm.—S-ro J. Mathieson el Blackhill, Co. Durham, la 19an de Novembro, faros paroladon antaŭ la "Tyneside Phonographers' Association," pri "Kial mi estas Esperantisto."

Plymouth (The Three Towns).—La anoj de "La Tri Urboj Klubo" tre energie propagandas Esperanton. La ĵurnalo *The Western Independent* ĉiusemajne daŭrigas presi Esperantan artikolon. Oni deziras sciigi, ke pro kreskado, la kunveneo estas nun pli taŭga ĉambro, nome ĉe "The Welcome," Fore-street, Devonport, ĉiumerkrede, je la 7a ĝis la 10a, anstataŭ marde. Varbiĝis multon da novaj membroj kaj kalkulas inter ili kelkajn sinjorinojn, kiuj, oni ŝatas konстатi, tre laboras por la Esperantismo, kaj la klubo havas helan estontecon.

Pontefract.—La grupo kunvenas la duan jaŭdon ĉiujonate, je la 7a vespere, en la *Free Library, Salter-row*. Elementa kaj supera kurso estas farataj de S-ro J. H. Hepworth.

Portsmouth.—Kvankam tre okupata pri sia plibonigado, la ĉi-tiea grupo ne forlasis la propagandan flankon de la afero. Antaŭnelonge oni elektis specialan komitaton, kiu, per la faka sekretario, S-ro Ede, sendis leterojn, grupkartojn kaj ŝlosilojn al estroj de la policanoj kaj poštistoj, kaj al la oficistoj de la Limimpostejo. Ĉiuj respondis danke kaj favore. Komuniko ankaŭ estis sendita al la komitato de la Publikaj Biblioteko kaj nun oni povas tie prunte preni Esperantajn librojn kaj ankaŭ legi la BRITISH ESPERANTIST, kiu kuſas sur la tablo de la legoĉambro. La Propaganda Komitato sukcesis veki la intereson inter la lokaj membroj de la "Laborista Edukada Asocio" (Workers' Ed. Ass.), "Socialista Ligo" kaj "Lernejo por Plenaguloj" (Adult School). Laupete, S-ro Hill paroladis al tiu ĉi lasta societo kaj gajnis multajn rekrutojn. Dum la vintra sezono, S-ro Fennall, kun la helpo de kelkaj grupanoj, arangos "Esperantan Vesperon" por la gildanoj de diversaj "Gildoj," kaj per tiuj rimedoj espereble atentigos multe da miloj al nia rapide disvastiĝanta movado.

Rochdale.—La vintra kunvenaro komencigis la 16an de Septembro per lumbilda parolado pri "Vizito al Rouen," prezentita de unu el la grupmembroj. Ĉiusemajne dum la vintro oni arangas diskutadojn, kvaza-parlamenton, muzikajn, kaj faros grandan specialan feston en Novembro je la okazo de la datreveno de l' societa fondigo.

Shipley.—Kun aliaj Esperantistoj el ĉi tiu regiono, invititaj de la Bradforda Grupo, la anoj de la Shipley'a Grupo ĉeestis la feston en Esholt; kaj malgraŭ la kondolenco reciproke farataj pro la nepovo ĉeesti la Kvinan,

a festo tute ne ŝajnis funebra. Kelkaj okazaj vizitantoj al *Yorkshire* aj festoj ja ekkonkludus, ke la festanoj havas kiel devizon: "Ni estu gajaj, ĉar la vivo ne estas longa." Tamen krom la gajajoj, la seriozan semadon oni priklopodas persiste kaj diversmaniere. S-ro Farningdon el Rochdale, vizitante la feston, raportis kelkajn agrablaĵojn Esperantajn, kiujn li spertis en aliaj landoj kaj konvinkis ĉiun pri la senduba utileco de nia amikiga lingvo.—Septembro 18an, en *Carnegie Hall* — bela konstruaĵo — en Shipley, la grupo komencis la vintran sezonon per vistoronda kaj danca festo, kiam gaste ĉeestis la estro kaj sekretario de la Edukada Komisio. La fondinto de la grupo, S-ro E. Parker, nun loganta en Londono, kantante pruvis al la ne-Esperantistoj la kantindecon de la lingvo.—La sekstantan merkredon, S-ro Holmes, la energia Bradford'a sekretario, faris parolon kun lumbildo, kiu pruviĝis tre interesa kaj tre efika propagandilo. Pli sinceren komplimenton, ol faris la lanternisto, oni ne povas deziri. Tiu persono, supersata Esperantisto, de longatempe nutrita multlekcie, fojon post fojo, neaperigis la bildon gustatempe, tute absorbite en la lekcio.—Notinde plue, estas la bonaj priskriboj de la Kvina Kongreso aperintaj en la *Yorkshire Daily Observer*, grava gazeto en ĉi tiu regiono. Oni facile divenas, kies facila plumo verkis tiujn interesplenajn artikolojn, multe ŝatitajn de la ordinara gazet-legantoj.—F.

Stockport.—La jara generala kunveno de la Stockport'a Grupo okazis je la 1-a de Oktobro en la *County Restaurant*. S-ro Lewis el Manchester faris tre entuziasmigan paroladon pri la deveno kaj progreso de nia kara lingvo, kaj ankaŭ parolis pri ĝia utileco kaj beleco. S-ro Hiles, la prezidanto de la kunveno, aldonis kelkajn vortojn pri la strukturo de la lingvo, kaj poste, sciigoj pri la klasoj por la venonta sezono estis donataj, kaj oni havis la plezuron bonvenigi kelkajn novajn anojn.—F. E. K.

St. Albans.—Tiu ĉi societo, kvankam iom malrapide, tamen certe kaj fortike kreskas. Oni arangis kunveni ĉiun vendredon dum la vintro (Oktobro ĝis Marto) laŭ jena maniero: La unuan vendredon en la monato ĉe la domo de anino por muzika vespero; la duan en *Dear's Hotel*, 22, *London-road*, je 7.30 ĝis 8.30 v., por elementa instruado al komencantoj, la ceteron de la vespero por agado kaj parolado, tute Esperante, kiam oni goje akceptos samideanojn kaj amikojn el ĉie (biciklistoj notu!); la trian vendredon por literaturo — legado el bonaj Esperantaj verkajoj, kaj la kvaran por legado, kritikado kaj plibonigo de originalaj verketoj kaj tradukajoj. Tri geanoj afable proposis ĉambrojn por tiu ĉi celo. Cetere, la sekretario volonte gvidos tra nia fama katedralo samideanojn, kiuj vizitos St. Albans, kaj laŭpove klarigos la vidindajojn de tiu ĉi antikva konstruaĵo. Prefere estus, ke ĉiu celanta tion, komuniku kun tiu sinjoro por fari la arangojn.

SKOTLANDO.

Glasgovo.—Per aloge presita prospekto de l' grupo, ni vidas, ke la Glasgovaj Esperantistoj pasigos dum la vintro tre agrablajn vesperojn. La kunvenoj, kiuj estas kondukataj nur Esperante, okazas ĉiulunde je 8.30 v. en la *Christian Institute*, 70, *Bothwell-street*. Kursoj elementaj komencigos jaŭdon, la 14an de Oktobro, je 7.30 v., kaj lunden, la 18an, je 8.30 v. Oni instigu siajn amikojn ĉeesti! Sin turni al la sekretario.

Montrose.—Ĉi tiu societo komencis sian vintran kunvenaron la 30an de Septembro, en la Akademio, kie per komplezeo de la Loka Lernejestraro, la kunvenoj de nun okazados ĉiun vendredan vesperon. Unu vesperon en ĉiu monato oni okupos per koncerteto kaj distrado. La grupsekretarino estas nun F.-ino J. O. Fettes. Oni kore invitas la ĉeestadon de ĉiuj amikoj.

St. Andrews.—Dank' al la klopodoj de S-roj Page kaj Fred el Edinburgo, oni nun sukcessis fondi grupon

tie ĉi. Prezidanto kaj instruanto de la kurso estas S-ro J. T. Haxton; sekretario estas S-ro J. Moran, 3, *Melbourne-place*. F.-ino Robb el Edinburgo faris en Universitata Halo Esperantan kurson al vegetaranoj; je ĝia fino oni donacis al ŝi memorajon.

LA FEDERACIOJ.

La sepa kvaronjara kunveno de la Esperantistaj Grupoj de Lancashire kaj Cheshire, okazinta en la Urbdomo, Southport, la 2an de Oktobro, estis la plej sukcesa ĝis nun organizita de la Federacio. Preskaŭ 200 geesperantistoj el la diversaj societoj en la regiono ĉeestis la kunsidon, kiun prezidis la Urbestro mem, S-ro J. W. Paton, akompanata de sia edzino. Post paroladeto de Pastro Ashby, skizanta la rapidan progreson de la afero en Southport, S-ro Paton kore bonvenis la delegitojn en la nomo de la urbo. F.-ino M. L. Jones, prezidentino de la Federacio, rakontadis tre interese pri la Barcelona Kongreso. S-ro W. B. Currie, Burnley, iniciatis pri la plej efikaj manieroj propagandi Esperanton vigilan diskutadon, kiun partoprenis S-roj Blaise (Londono), P. Foster (Southport), H. Brisbane Eldon (Manchester), k.a. Komuna temangado prezentis agrablan okazon por Esperanta babilado, kiel ankaŭ posta vizito al la Artgalerio kaj la ludado de l' Urbestra Muzikistaro.

PLIGRANDA BRITUJO.

Aŭstralio.—*Nova Suda Kimrujo*: Ni ricevis kelkajn kontentigajn informojn pri la progreso de Esperanto en ĉi tiu regiono. Starigis nun Esperanta Konsulejo en SYDNEY, la ĉefurbego, ĉe 38, *Queensland Offices, Bridge-street, Sydney*. La oficejo zorgas i.a. pri instruado pri la lingvo, pruntedonado de Esperantaj libroj, komerca reprezentado, kaj ĉe ĝi kunvenas la "Klubo Zamenhofa."—En EAST MAITLAND, S-ro E. A. Pryke en Augusto malfermis bone sukcesantan Esperantan kurson, kun la varma subteno de la lernejestro kaj la anglikana pastro.

Novzelando.—Nia fervora amiko S-ro H. A. Epstein daŭrigas senlace propagandi Esperanton en ĉi tiu lando. En WELLINGTON li sukcesis komencigi 6 kursojn, unu en la Socialista Aulo, unu en la Y.M.C.A., unu por sinjorinoj, kaj du-tri privatajn, ankaŭ instigis la starigon de la Wellington Esperanta Societo, kiun prezidas la Urbestro mem. Multaj gazetoj enpresis artikolojn pri nia afero, kaj varma intereso vekiĝis ĉe diversaj komercistoj kaj profesuloj. Trointe en INVERCARGILL alian okupon, per Esperanto, nia samideano ankaŭ tie starigis diversajn kursojn kaj akiris la favoron de kelkaj jurnaloj. Antaŭ kelkaj monatoj li fondis la "N.Z. Rondiranton," al kiu nun pli ol 30 geesperantistoj el ĉiuj partoj de N.Z. aliĝis. Koran gratulon al nia energia amiko, kaj sincerajn bondezirojn pri la plua sukceso de lia disvastiga klopodado!—Per tranĉajo el la *Poverty Bay Herald, Gisborne*, ni vidas kun pliezuro, ke nova grupo fondiĝis en tiu urbo la 20an de Augusto, sekve de propaganda parolado farita antaŭ la loka Y.M.C.A.



B.E.A. Legocambio.—La Membroj bonvole notu, ke ĝis nova aponco ĉi tiu ĉambro estas malfermata ĉim jaŭdon de la 6a ĝis la 9a vespere, por babilado, diskutado, k.t.p., en Esperanto. Oni esperas, ke multaj samideanoj profitos la okazon por sin ekzerci kaj plibonigi en la parolado de la lingvo.—Car kelka Membroj ŝajne ankoraŭ ne scias pri la ekzisto de loko, kie oni povas rigardi kaj legi ĉiujn gazetojn kaj librojn esperantajn, ni deziras sciigi al ili, ke la B.E.A. Legocambio estas malfermata por ili ĉiutage de la 10a ĝis la 6a, sabate ĝis la 9a.

Publikaj Paroloj pri la Kongreso, k.t.p.—S-ro Bolingbroke Mudie kaj aliaj ĉiam estas pretaj lumianiere provi antaŭenigi la propagandon. Sin turni al Sekretario B.E.A.

La Haga Esperanta Tramo.

Jam de kelkaj jaroj, okaze de la naskiga datreveno de la regino Wilhelmina, je la 31an de Aŭgusto, la tramkonduktoroj kutimas ornami elektrajn tramojn per flagoj, floroj, fruktoj, aŭ doni al ili la aspekton de hina sanktejo, antikva gastejo, lulilo, elefanto, k.t.p.

Tiu ĉi originala amuzajo allogas amason da eksterlanduloj al la belega holanda urbo.

Dum la pasinta vintro kelkaj konduktoroj sekvis Esperantajn kursojn kaj tiuj servoruloj nun havis la laudindan ideon ornami tramon per Esperantaj. Pli bona propagandilo ja ne povis esti elpensita. Dum la tutta tago Esperanta tramo veturis de Hago al Seveningo, fama banejo, kie ĉiusomere kunvenas multaj fremduloj. La konduktoroj, kiuj dejoris sur tiu tramo, respondis al la petoj de la vojagantoj en la internacia helplingvo. Ke la tramo allogis la admirantajn rigardojn de urbanoj kaj eksterlanduloj, oni facile komprenas, se oni gis estus vidinta. La du largaj flankoj estis kovritaj per blanka tolo, sur kiu estis pentritaj la tergloboj, interligitaj per banderolo, sur kiu oni skribis : "Internacia helplingvo Esperanto." Malantaŭ la tergloboj oni vidis gigantajn verdajn stelojn. Sub ĉiu fenestro oni legis Esperantajn devizojn kaj la flankoj estis borderitaj per altaj kanoj, kiuj portis 60 gajajn Esperantajn flagetojn. La superparto estis drapirita per multkoloraj internaciaj flagoj. Sur la antaŭa kaj malantaŭa balkonoj, oni legis, en grandaj literoj : "Ĉiam antaŭen," bona devizo por tramo, sendube.

Vespere ne estis necese veturi en profunda mallumo, ĉar la belaj verdaj lumigiloj, formantaj kune grandan stelon, montris la vojon al ĉiuj. Tute certa estas, ke de tiu ĉi dato ne ekzistas Hagano, kiu ne gaje ekkriis aŭ mirigite halbutis se nur unu fojon dum sia vivado, la nomon : "Esperanto."

Ĉiuj, kiuj deziras posadi tiujn efikajn propagandilejn, sendu poštmandaton al la Sekretariino de la Haga Klubo, Fraŭline N. Boen, *Koningin Emmakade 96, Haag, Holland*, nur unu spesmilon, kaj per rekomendita presajo oni tuj ricevos 35 ilustritajn kartojn.

Studenta Rondeto Esperantista en Praha fondita la 1 Februaron, 1909, por propagandi Esperanton inter studentoj rapide kreskas, stariginte jam multajn sekciojn en bohemaj urboj. Delegita fako de S.R.E., kiu antaŭ nelonge estis fondita, havas jam delegitojn preskaŭ en ĉiuj bohemaj urboj; al la delegitoj estas sendataj informoj pri Esperanta movado kaj utilaj konsilioj. Tiel estas organizita la tuta bohema studentaro Esperantista. S.R.E. havas post 1½ jaro de ekzistado jam pli multe ol 100 membrojn. Ĝi petas ĉiujn studentojn kaj amikojn de studentoj, grupojn, ke ili ekligu interrilatojn kun ĝi. S.R.E. malfermas samtempe enketon pri propagando de Esperanto inter studentoj. Por pli efika propagando de Esperanto inter bohemaj studentoj arangos S.R.E.

EKSPOZICION DE TUTMONDA STUDENTA LITERATURO.

Por ke tia ĉi entrepreno povu esti la plej brila, petas S.R.E. ke oni bonvolu sendi laŭ adreso : *Praha I.-342, Kafejo Union*, por *Studento*, ĉion interesan, precipice ĉiulingvajn studentajn gazetojn, revuojn, verkojn kiuj traktas pri studentaro, k.t.p. Al ĉiu, kiu sendos ion por nia ekspozicio estos sendita *Studento*, internacia monata revuo de Esperantistoj. Ni atentigas, ke estas eldonitaj Esperantistaj hortabeloj por studentoj, presitaj sur bela kartono. Ekzempleron ni sendos al ĉiu, kiu sendos ilustritan postkarton por ekspozicio laŭ citita adreso. Por reciprokaj servoj ĉiam preta, *Studento*, Esperanta gazeto por studentoj, *Praha II.-516, K. Kytka*.

Ĝojo por Ĉiuj Gefratoj!

En Rumanujo (Bukurešto), S-ro D-ro G. Robin faris, per la Direkciono de "ätra Luminoasă," petskribon al Ŝia Mosto la Regino Elizabeto (en Sinaia), por ke ŝi bonvolu doni al la "Rumana Esperantista Societo" la ekskluzivan rajton de tradukado de ŝiaj verkoj (publikigitaj sub la pseudonimo "Carmen Sylva") kaj ke ŝi bonvolu preni la saman societon sub sia alta protektado. Je la 12a de Septembro, 1909, la prezidanto de "Rum. Esp. Societo," S-ro D-ro G. Robin, ricevis respondon de Ŝia Mosto la Regino Elizabeto aŭ pli bone de nia Kara Samideanino Poetino, "Carmen Sylva," patrino de la malfeliĉuloj kaj de la blinduloj.

En la letero estas dirite, ke ŝi volonte ĉion akceptas; prenas la Rum. Esper. Societon sub sian altan protektadon kaj donas al ĝi la ekskluzivan rajton de tradukado de ŝiaj verkoj, k.t.p., k.t.p.

La Esperantistaro devas sci, ke ŝi estas la unua el la reginoj, kiu lernas Esperanton kaj afable permesis, ke ĝi estu enkondukita en ŝia instituto inter la blinduloj kaj nun al ni estas ĝojege audi la blindulojn belege parolantajn nian karan lingvon !

La entuziasmo de la rumanaj gesamideanoj estas nepriskribebla; pro tio, ke nun iliaj societoj estas sub la protektado de Ŝia Mosto la Regino (car la "Rum. Esp. Soc." havas filiojn en la provincoj kaj en Bukurešto). Vivu Ŝia Mosto la Regino Samideanino "Carmen Sylva" ! Vivu Esperanto kaj ĝia Kreinto !

N. HRISTOSKOFF.

Paca Tago en Aŭstriaj Lernejoj.—En kunsido de l'aŭstria parlamento la 24an de Marto, 1909, eminenta bohema politikisto kaj filozofo D-ro T. G. Masaryk, profesoro de bohema universitato en Praha, prezentis proponon, per kiu "La imperiestra reĝa administracio de instruado estas petata enkonduki en popolaj kaj mezaj lernejoj pacan tagon (22an de Februaro kiel pacan tagon internacian aŭ 18an de Majo por rememoro de la unua konferenco en Haag) kaj ordoni al direktoroj de lernejoj, edukejoj kaj instruejoj, ke ili zorgu pri la pacaj ideo ne sole en pacaj tagoj, sed ĉiam dum la instruado, precipice historia." En la propono subskribita de 29 diversnaciaj aŭstriaj deputitoj, la proponinto priskribas, kiel diversaj ŝtatoj subtenas en lernejoj pacajn ideojn. Itala ministro Boselli ordonis (1906) al ĉiuj normalaj kaj mezaj lernejoj, ke oni faru al la junularo parolojn pri la pacaj tagoj internacia. Hungaria ministro Grafo Apónyi ordonis (1907), ke la 18an de Majo la instruistoj aŭ membroj de pacifistaj societoj faru al junularo taŭgajn klarigojn. Same faris diversaj ŝtatoj de Usono, kiu starigis pacan tagon en lernejoj. Por la sama afero oni laboras ankaŭ en Francujo kaj Anglujo. En Aŭstrio la moravia parlamento akceptis similan proponon (de D-ro Fischer) kaj longa vico de instruistaj konferencoj de ĉiuj aŭstriaj landoj prezentis samsecan rezolucion al siaj landaj lernejaj konsilantaroj (laŭ iniciato de Pacifista sekcio de Jednota Komenského). Karakterize estas, ke la propono estas farita en la tempo, kiam milita dangero minacis Aŭstrion. (*Bohema Esperantisto*, Praha III., Kampa 495, Bohemujo; Sm. 1.70.)

Deziras logi en angla hejmo, apud Landono, germano, 21-jara. Lia patro (servora Esperantisto) interŝange volus akcepti junulon aŭ junulinon en belan gardendomon en Wandsbek, apud Hamburgo, tuj, aŭ proksiman printempcon, someron aŭ laŭ arango. La suprecitita germano estas modesta, malmultpostulanta sinjoro, kiu precipe deziras perfektiĝi en la angla lingvo.—Sin turni al H. V. Interšango, ĉe B.E.A., 133, High Holborn, London, W.C.

La Ganduro de Mahometo.

Tradukis ALEXANDER E. LEE.

Tiu ĉi rakonto jam vagis en kelkaj lokoj.
Tradukite el la franca lingvo ĝi aperis en
la "Singapore Free Press," poste en "The
Collector" and "T.P.'s Weekly."

Sinjoro Perrichon — la singardemo ordonas, ke mi kaſu al vi lian propran nomon — estas artista vagulo, kiu venas ĉiun vintron al blanka Algero, serĉante agrablan klimaton kaj kuriozajn. Entuziasma kolektanto de la diversaj, kaj kelkfoje dubaj, Musulmanaj artaĵoj de Arabujo, Berberujo kaj Moroko — bataliloj, juveloj, krucoj, pendajoj, brodajoj, k.t.p. — instigite, kiel li kredas, de mirinda amo por tiaj aferoj, kaj, kiel la aliaj kredas, de mirinda nescio pri ili, li ĉiam atendas bonajn okazojn kaj pasigas sian tempon en la posttagmezo, irante de unu komercisto al alia.

Antaŭ nelonge li eniris la butikon de Birkadem, la vendisto de antikvaĵoj en la strato Bab-el-Oued, funde de la Kasba'o, la araba urbo. Birkadem, en tiu momento, estis okupata pri la arango de nove alvenintaj artikoloj en la fenestro. Lia komizo, Ahmed, malpakis kelkajn artikolojn el granda kesto, kaj por esti pli libera en siaj movoj, demetas sian tunikon. Sinjoro Perrichon ekzamenis la artikolojn, nomis al si la prezojn, kaj faris proponojn; nature la prezoj nomitaj estis amike taksitaj.

"Kaj tio ĉi?" diris Sinjoro Perrichon subite.

"Kio?" diris Birkadem.

"Tio ĉi," rediris Sinjoro Perrichon, dum li elmontris al la iom surprizita vendisto, longan *baju* el paleflava ŝtofo, kiu pendigis, kvazaŭ en loko de honoro, sub la plej belega kristalo en la butiko. Birkadem estas ruza orientulo, kiu havas ĉiam pretan, elpenseman spiriton.

"Ho! tio," li diris, per tono, kiu estis samtempe respektplena kaj senzorga; "tio ne estas vendeblo."

"Kio do ĝi estas?"

"Ĝi estas unu el la *ganduroj* de Mahometo."

Mi diras al vi nenion novan, kiam mi klarigas, ke *ganduro* estas preskaŭ sinonima al ĉemizo — oni ofte portas ĝin ekstere de la pantolono — sed por la plejmulto da Eŭropanoj ĝi estas tuniko.

Ahmed faris grandegan sed silentan rideton, kiam li aŭdis sian mastron atribui la *baju*, kiun li tre bone konis, al Mahometo.

"Ĉu al Mahometo la Profeto?" demandis Sinjoro Perrichon, jam ekscitita.

"Al la Profeto mem," respondis Birkadem per solena voĉo. "Sed, kiel mi jam diris, ĝi ne estas vendeblo. Aĉetu ion alian." Kaj li

komencis montri al Sinjoro Perrichon kelkajn antikvajn pistolojn, mozaikojn, k.c. Sed Sinjoro Perrichon tro enpensiĝis pri la *baju* de la Profeto.

Salomonon estis sendube prava, kiam li diris en unu el siaj sentencoj, ke bona servanto estas la okulo de la mastro. Ahmed, la komizo, ne bezonis avertan signon de Birkadem. Li iris al la kaso, eltiris dek spesdekojn, eliris el la butiko, kaj marĝis tra strateto de la Kasba'o. Silenta, Musulmana rideto ludis sur liaj lipoj. Post du minutoj li revenis al la butiko, kaj daŭrigis sian laboron. Sinjoro Perrichon ankoraŭ diskutis kun Birkadem. Maljuna arabo, malrapidmova kaj pia, eniris la butikon kvazaŭ ĝi estas moskeo. Liaj piedoj estis nudaj, tial ne estis necese depreni siajn ŝuojn.

Li ŝajne ne rimarkis Sinjoron Perrichon nek vidis Birkadem, sed iris rekte al la *baju* de la Profeto, levis ĝin kun respekto, kaj pie ĝin kisis. Du tri senlaboruloj de la *Place du Gouvernement*, virino de deca ŝajno, portisto, kaj vendisto de poštarkoj envenis, unu post la alia, por fari respekton al la sankta vestaĵo. Tiuj ĉi faroj, kiuji tute ne mirigis Sinjoron Perrichon, montris la saman karakteron de sincera kaj profunda pieco. Nenio estas tiel kortusanta kiel la pieco de la naivuloj; kaj la naivuloj similas, kaj rekonas unu la alian en ĉiaj klimatoj. La malpala vizago de Ahmed la komizo ankoraŭ pli nigrigis pro ridado: malica ĝojo montrigis en liaj okuloj, kiuji eljetis rigardojn de amika kunkulpeco sur la *baju*, sed ĉar lia dorso estis turnita al li, Sinjoro Perrichon vidis nenion. Li fariĝis nerva. Li revis pri la akiro, je kia ajn kosto, de tiu respektinda *baju*, kies malfalseco estis konfirmita de la malgranda procesio da adorantoj, kiun li ĵus vidis. Porti hejmen la korvestaĵon de la Profeto!

Birkadem, kun senzorga mieno, lasis sian klienton meditadi. Li ne povis ne marĉandi pri la *baju*.

"Ne," diris Birkadem, "ĝi ne estas vendeblo." Sinjoro Perrichon farigis obstina, varmigis, insistis, kaj fine petegis. La bonkora Birkadem permesis al si moligi iom malrapide sub la influo de sia fidela kaj malavara kliento. "Car vi estas amiko mia, kaj ĉiam antaue faris bonajn aĉetojn, mi konsentas fari por vi tion, kion mi ne farus por iu alia. Prenu do la *baju* de la Profeto; de nun ĝi estos la via, sed promesu min, ke kiam vi alvenos en vian propran landon, vi tre zorgos pri ĝi; faru al ĝi la honoron, kiun ĝi meritas, kaj ĉirkaŭ ĝin per la plej alta respekteto. Mi aĉetis ĝin de marabaŭto, kiu ricevis ĝin de sia avo, kiu ricevis ĝin de iu antaŭulo, kiu ricevis ĝin laŭ rekta linio de unu el la posteuloj de la Profeto

Mahometo la glora, kiun ni ankoraŭ nomas *El Emin*, aŭ La Fidelulo. Mi vendas ĝin al vi je la sama prezo, je kiu mi mem ĝin pagis, nur aldonante bagatelan sumeton, kiel profiton. Ahmed, deprenu tiun *baju* por tiu ĉi sinjoro, kaj metu ĝin tre zorge en belan keston. Mi efektive donacas ĝin al li pro amikeco."

Sinjoro Perrichon pagis la nomitan prezon sen ia hezito, forportis sub la brako la *baju* en bela kesto, iris tra la strato Bab-el-Oued kun pašoj de venkinto, kaj ĉe la *Place du Gouvernement* li veturis tramveturile ĝis *Mustapha-Supérieur*, kie li restis kelkajn tagojn.

Birkadem kaj Ahmed rigardis lin, dum li foriris de la pordo. Kiam li malaperis post la angulo de la strato, Ahmed diris al sia mastro :

"Kaj mia *baju*?"

"Jen," diris Birkadem, kiu sciis kiel agi post tia felica okazo, "jen estas io por aĉeti alian." Kaj li donis al li du spesmilojn, por aĉeti alian *baju*, aŭ novan aŭ malnovan.

"Gi havis du manikojn," diris Ahmed, kaj Birkadem donis al li ankoraŭ dupsesmilan moneron.

Mia Kredo.

Ne konservu la alabastrajn ujojn de via amo kaj kompatemo sigelitaj, ĝis mortos viaj amikoj.

Plenigu iliajn vivojn de dolĉeco.

Parolu aprobabjn gajigajn vortojn dum iliaj oreloj povas ilin audi, kaj dum iliaj koroj povas esti travibrigitaj kaj plifeliĉigitaj per ili.

La bonkorajn parolojn, kiujn vi intencas diri, kiam ili estos foririntaj, diru antaŭ ol ili iros. La florojn, kiujn vi intencas sendi por iliaj ĉerkoj, sendu por heligi kaj dolĉigi iliajn hejmojn, antaŭ ol ili forlasos ilin.

Se miaj amikoj havas en provizejo alabastrajn ujojn plenajn je bonodoraj parfumoj de simpatio kaj amemo, kiujn ili intencas frakasi super mia mortinta korpo,— mi preferus, ke ili liveru kaj malfermu ilin en miaj enuaj kaj maltrankvilaj horoj, por ke mi refreſigu kaj gajigu de ili, dum mi ilin bezonas.

Mi plivolus kuſi en neornamita ĉerko sen floroj, kaj ke mia funebra ceremonio estu sen lauda parolado, ol vivi sen la dolĉeco de amo kaj simpatio.

Ni lernu olei por ilia entombiĝo niajn amikojn antaue. Bonkoreco post morto ne gajigas la maltrankvilan spiriton. Floroj sur la ĉerko jetas malantaŭen nenian bonodoron super la laciga vojo de la vivo.

El originalo tradukis A. J. A.

Letters to the Editor.

SIR,—I do not know whether anything has been already done in the matter, but, if not, I think it is most desirable, and quite time, that the B.E.A. should have a Parliamentary Committee, whose duty should be the preparing of the way for the question of the adoption of an international language being brought before Parliamentary candidates. Within a few years at latest, perhaps within a few months, we shall have a General Election, when certainly the question should be brought forward. I think the B.E.A. should have a carefully framed question prepared in good time, to be sent up to candidates at all political meetings. The question should be short, simple, direct, and modest in its demands. I think it would be well that in the meantime the name Esperanto should be kept in the background. I would suggest that the question should be somewhat in this form :—

"Are you prepared to support a motion requesting the Government to take counsel with other Powers with a view to facilitating the introduction of an international auxiliary language?"

Esperantists are not a very strong body yet; but even a small body, if united and persistent, can do a lot. But a variety of questions, wise and otherwise, sent up by enthusiastic supporters, would be calculated to do more harm than good.—Yours truly,

W. J. WINGATE.

South Hetton Vicarage, August 13, 1909.

(The opinions of our readers on this question should be sent direct to the President of the B.E.A., or to the Secretary of the Propaganda Committee.)

DEAR SIR,—I am extremely anxious to form a London boys' Esperanto Club, of which the members should be either boys at school in London, or boys who live in London but going away to school. During term time there should be sent round lists saying who should correspond with whom. Meetings would be arranged in holiday time, officers elected, and, if the society were a great enough success, a journal might be run by it.

Will any of your readers who are below eighteen correspond with me on the subject at Stoke House, Slough, Bucks?

CECIL J. S. SPRIGGE,
Member B.E.A., 642, Adresaro no. 17,677.

A German Headmaster's Opinion.

In the thirty-fourth yearly report of the *Realschule* and *Realprogymnasium* in Grossenhain (Saxony), Director Professor Dr. G. W. Schubert directs attention to the great benefits which will accrue to the commercial world as the teaching of Esperanto becomes general. He is much struck by the ease with which the language may be acquired, its flexibility and clearness of expression. He emphasizes the usefulness of Esperanto as a means of reducing the number of languages demanded by the exigencies of modern commercial intercourse, and keenly recommends his colleagues in the teaching world to advocate its introduction into the public schools.

Fraŭlino deziras akompani familion al Aŭstralio. Zorgado pri infanoj aŭ alia helpado kontraŭ vojaĝ-elspezoj.—Sin turni al A. H., ĉe B.E.A., 133-6, High Holborn, W.C.

The British Esperanto Association (Incorporated).

CANDIDATES FOR MEMBERSHIP.

EXTRACT FROM RULES.—"If no objection shall be lodged within fourteen days, the Secretary shall inform the candidate that he is admitted as a member."

W. ADAMS, 2, Albion-road, Lewisham, S.E.; W. BROWN, B.Sc., Glenbrook Bungalow, Westhere, near Canterbury; Miss A. COPE, Keeyuga, Lorne, Melbourne, Australia; Miss C. A. DERBY, The Ludlow, Copley-square, Boston, Mass., U.S.A.; O. EGLI, 174, Lancaster-road, Notting-hill, W.; W. FALCON-STEWARD, Newton Manor, Gosforth, Cumberland; G. FRASER, Mangaroa, Ohura, Taranaki, New Zealand; A. B. GRIEVE, 13, Railway-place, Montrose; Miss K. E. HAMMER, Women's Missionary College, Inverleith-terrace, Edinburgh; Rev. P. U. HENN, 37, Cedars-road, Beckenham, Kent; E. D. INWARDS, The Firs, Little-park, Enfield; Dr. O. JENNINGS, 3, Rue de la Croix, Le Vesinet, France; H. JONES, 19, Marlborough-road, Swansea; A. J. LEBRASSE, 69, Pamplemousses-road, Port Louis, Mauritius; W. H. MARRIOTT, "Parkville," Westfield-road, Leicester; Miss M. E. PARKER, 25, Wellington-crescent, Shipley; Miss A. G. RAWLINSON, 27, Windsor-road, Tue Brook, Liverpool; J. SKURRIE, Boulder Main Reef, Kamballie, West Australia; F. W. SHAW, 40, Gresham-street, Coventry; W. WOOD, 7, South-street, Rawdon, Leeds; A. WALKER, School House, Holystone, Rothbury, Northumberland; Miss F. HUMPHREY, 6, Redburn-street, Chelsea, S.W.; J. ARTHUR HILL, Wensley Bank, Thornton, Bradford; Dr. ED. KLEINER, Arcadia-bridge, Pretoria, S.A.; J. M'LACHLAN, Heaton Moor College, Heaton Moor, by Stockport; Miss H. COTTON, 21, Hill Top-road, Slaithwaite; J. DONNELLY, Henshaw-street, Oldham; J. A. KYLE, 29, The Vineyard, Richmond, Surrey; H. VAN ETEN, 82, East Dulwich-road, East Dulwich, S.E.

PASSED PRELIMINARY EXAMINATION.

*JAMES C. BOYD, Kennoway, Fife; Miss ADA K. VACHER, Whetstone, London, N.; Miss CLARA E. BAUER, Milbrulong, N.S.W., Australia; Miss ALICE M. WILLIAMS, Devonian, R.S.O., Cornwall; WALTER GREAVES, JAMES H. GREAVES, *Miss ALICE SMITH, Miss HARRIET, J. HARTLEY, Rishton; *JOHN J. FELL, Atcrington; *CLARENCE L. DEAN, Brook-green, W.; *CHARLES FOULDS, *Miss ELIZABETH EAST, *FRANK TURNER, *Miss EDITH CATLOW, Mrs. MARTHA A. SMITH, *THOMAS FARNSLEY, *Miss LILY POPPLETON, *JOHN CREWE, *JAMES HOWARTH, Burnley; *SAMUEL HAIGH, Twiston, near Clitheroe; Miss EVA P. CATO, Mrs. FLORENCE NEWICK, Miss JESSIE STEWART, Miss MARGARET E. GILLIBRAND, Miss MARY A. STEWART, *JOHN Y. WOODWARD, Auckland, New Zealand.

PASSED ADVANCED EXAMINATION.

*CLARENCE L. DEAN, Brook-green, London, W.; *Miss ANNIE EGMORE, Norwich; Miss CHARLOTTE FARNWORTH, Lancashire

* Denotes that the candidate has passed with distinction.

FRANK O. ZOCHER, Caversham; CHARLES S. MIDDLEMISS, Calcutta; J. H. PARKER, Lancaster; G. GIBBONS, Redhill, Surrey; Miss MARY K. DRURY, Derby; *JOHN WILSON, Leek, Staffs; A. W. PORRITT, Dewsbury.

Council Meeting, B.E.A.

Held at the offices of the Association on Monday, September 27, under the presidency of Mr. J. M. Warden, of Edinburgh. Present: Messrs. Chatterton, Cox, Fitton, Harrison Hill, Honeysett, Phillimore, Sexton, Misses Blake, Lawrence, O'Brien, Schafer. In attendance: Messrs. Millidge, Rolston, and the Secretary.

Among the subjects discussed were the following:—

Fellowship Certificate.—Mr. Sheehan's design was submitted to the meeting and approved generally. It was resolved that a letter of hearty thanks be sent to Mr. Sheehan for his kindness in executing the work for the Association.

Fifth Esperanto Congress.—It was decided that a letter should be sent to the Barcelona Town Council conveying the thanks of British Esperantists for all that had been done by the town for the success of the Fifth Esperanto Congress.

The Death of F-ino Schroeder.—Mr. Mudie's proposal that a letter of condolence be sent to the Danish Esperanto Society in reference to the fatal accident to F-ino Schroeder while on her way to the Congress was approved.

Notice is hereby given that the next meeting of the Council of the B.E.A. will be held on Monday, October 11, at the offices of the Association, 183, High Holborn, London, W.C., at 6.30 p.m. Following meeting, November 8, at same place and hour.

Fako de Korespondado Internacia (F.K.I.).

Sub tiu ĉi rubriko oni enpresas malgrandajn anoncojn de tiuj el niaj legantoj, kiuj deziras korespondadi kun alilanduloj. Ciu anoncanto devas pagi ses penceojn (25 spesdekojn) por trilinia enpresajo kiel sube (pli ol tri linioj po tri penceoj por ĉia komencita linio); ciu MEMBRO de la Asocio havas la rajton fari unu enpresajon senpagi.

620. **Columbus (Ohio), U.S.A.**—S-ro Elmer S. Caylor, Station A, Box 13, deziras korespondadi kun alilandaj samideanoj. Ĉiam respondas.

625. **Glasgow (Skotlando).**—S-ro Thomas Kimmet, 11, Leyden-gardens, Maryhill, deziras korespondadi per pošt-kartoj ilustritaj kun alilandaj samideanoj. Ĉiam respondas.

630. **Lungchow (Kina).**—S-ro Lo Task-Kwan, I. M. Customs, deziras interŝangi ilustr. pošt-kartojn, poštmarkojn kaj korespondadi per ilustritaj pošt-kartoj kun geesperantistoj alilandaj. (59)

637. **Debreczen (Hungario).**—S-ro R. Rajczi, Csokonai-nr. 13, 14, deziras korespondi pri literaturaj kaj estetikaj temoj, precipe pri angla literaturo. Preferus studenton de estetiko kaj literaturo.

638. **Danville (Penn'a), U.S.A.**—S-ro Curtis B. Lore, 111, Market-street, deziras interŝangi pošt-kartojn ilustritajn kun ne-usonaj Esperantistoj. Ĉiam kaj tuj respondos.

639. **Chemnitz (Germanio).**—Korespondadi kun eksterlandaj samideanoj deziras membroj de la grupo Kemnitza de la G.E.S. Adreso: Paulo Fabian, Nikolai-strasse 2.

640. **Pollando (Rusio).**—S-ro Aleksandro Tosić, fervojoficisto, stacio Koluski de fervojo Vars-viena, deziras korespondadi per letero aŭ pošt-karto kaj ilustr. pošt-kartoj kun fremdaj Esperantistoj el tutu mondo pri la fervojaj aferoj; ĉiam respondos; kaj ankaŭ pri aliaj aferoj. (60)

641. **Toledo (Ohio), Usono.**—S-ro Gaylord Brown, Box 999, Post Office, deziras interŝangi pošt-kartojn ilustritajn kun Esperantistoj elilandaj. Akurate respondos.

642. **Limoges (Francujo).**—S-ro Adri. A. Rouz, 7, Place d'Art, deziras seriozan korespondon kun samideanoj, kiuj povas agi kiel agentoj por Limoges emajlajoj. Artaj objektoj. Bona profito.

643. **Elliston (Sud-Australio).**—Pastro R. T. M. Radcliff, B.A (Cantab.), deziras korespondadi kun alilandaj pastroj.

644. **Prosenitz (Moravio, Aŭstrio).**—S-ro Zdenko Šika, Wallgasse, 3, volas korespondadi kaj interŝangi poštmarkojn kaj pošt-kartojn kun ĉiuj samideanoj de la tutu mondo.

645. **Barcelona (Hispanlando).**—S-ro Juan Amades, Peu de la Creu, 10, benda, dez. interŝangi ilustritajn pošt-kartojn nur ne-europajn. Nepre ĉiam respondos.

646. **Bradford (Anglio).**—S-ro J. Arthur Hill, Wensley-bank, Thornton, deziras korespondadi kun germana sinjorino aŭ sinjoro literaturama.

647. **Rilsk (Kurakoj gubernio), Rusio.**—S-ro P. B. Dolgorolov, Kasnalejstvo, deziras korespondadi kun alilandanoj.

648. **Kronstadt (sur Kotlino), Rusio.**—S-ro Senic, Morsteier Ingeneire Utiiste (Lernejo de Mataj Ingeneiroj), deziras korespondadi kun samideanoj per ilustr. pošt-kartoj.

649. **Barcelona (Hispanujo).**—S-ro J. Bubé, Consell de Ciències, 412, pral. 2, deziras interŝangi ilustritajn pošt-kartojn kun alinda gesamideanoj.